


El POPOLA CINIO

人民中國報

5
1962





Sporta Insuleto

La Sporta Insuleto estas kromnomo de Erŝatoŭ-insulo en la Perlo-rivero apud Kantono, kie estas granda klubo de sporto. Sur la insuleto ĉie dense ombras diversaj arboj, alte staras la ĉielskrapantaj palmoj, apud la verdaj bambuaroj abundas belaj floroj, de sur la rivero alblovas de tempo al tempo zefiro kun delikata aromo — jen loko vere bela kaj kvieta.

Sur la razenoj staras domoj laktkoloraj, en kiuj estas loĝapartementoj, biblioteko, kuracejo kaj sportejoj kun diversaj ekipaĵoj. La bela insulo servas al la gesportistoj kiel ripozhejmo kaj oportuna loko por altigi ilian teknikon.



1. La Sporta Insuleto – Erŝatoŭ.
2. Unu el la konstruaĵoj de la klubo.
3. Diverslokaj sportistinoj renkontigas.



Pri Lusin — la Fondinto

de Ĉina Moderna Literaturo

Kiel nian duan kontribuon al la esperanta literaturo post la *Ĉina Antologio 1949—1959*, ni jam finis la tradukan laboron por la libro *Noveloj de Lusin*, kies manuskripto estas transdonita al la presejo, kiam la legantoj legas ĉi tiujn liniojn.

La libro eliros kredeble antaŭ la fino de la kuranta jaro kaj entenos la tuton de liaj du novelkolektoj *Krioj* kaj *Vagado* kaj kvar el la ok noveloj de *Malnovaj Legendoj Nove Redaktitaj*. Do preskaŭ la tuto de liaj noveloj estas enmetita kaj forlasitaj estas nur kvar malgravaj pecoj cetere, ne tiom facile aprezeblaj por eksterlandanoj.

Por antaŭkonigi la verkiston al niaj legantoj ni enpresigas la suban artikolon.


— *La Red.*

LUSIN, la portanto de standardo de la ĉina kultura revolucio, granda verkisto, pensulo kaj revoluciulo, naskiĝis je la 25-a de septembro 1881, en la urbeto Ŝaŭhing, Ĝegiang-provinco. Tiutempe, la imperiismaj potencoj jam invadis en Ĉinion, devigis perforte la registaron de King-dinastio subskribi multajn traktatojn kiuj humiligis Ĉinion kaj kompromitis ĝian suverenecon, farante ĝin lando duonkolonia kaj duonfeŭdisma.

La Knabeco

Lusin, propre nomata Ĝoŭ Ŝujen, naskiĝis en malprosperiĝinta familio de instruitulo-ŝtatoficisto. Lia patro Ĝoŭ Boji estis malnovtipa intelektulo kaj lia patrino Lu Ĵuj, kamparanino memlerninta la legadon. Ĉar li ofte vizitis la patran domon de sia patrino dum la infanaĝo, la pejzaĝoj de sudĉinia kamparo, la simplaj kaj honestaj kamparanoj kaj ilia mizera vivo profunde gravuriĝis en lia koro.

Dum lia infaneco lia patro suferis daŭran malsanon, kaj la familio estis malriĉa, tial li povis lerni en lernejo nur tre malfacile. Post la morto de sia patro, li eĉ ne povis akiri monon por pagi la lernokoston. Kiam li estis 18-jara, li devis veturi al Nankino por lerni senpage en la Giangnan-a Mararmea Lernejo kaj poste en la Minekspluata kaj Fervoja Lernejo. Tiutempe iris la movado de konstitucia reformo de King-registaro kaj leviĝis la Boksista Movado de la popolamasoj. Tie Lusin ne nur lernis pri moderna naturscienco, sed ankaŭ akceptis la ideon de konstitucia reformo kaj modernigo kaj patriotisman penson. Li komencis observi la intense ŝanĝiĝantan ĉinan socion kaj la patrimon troviĝantan en danĝero, laŭ la vidpunkto de evoluismo, kaj opiniis, ke scienco estas la sola rimedo per kiu oni povas savi la patrolandon. Sekve, li veturis al Japanio en 1902 kaj eniris la Sendai-an Medicinan Kolegion. Sed en 1905, dum la Japana-Rusa Milito, Lusin vidis en dokumenta filmo



Lusin en Tokio, Japanio (1902).

la jenan scenon: iu sana, forta ĉino estas senkapigata de japanaj armeanoj kiel rusa spiono, ĉirkaŭ kiu multaj ĉinoj rigardas sensente. Tio forte skuis Lusin kaj li ek-sentis, ke estas multe pli grave sanigi la popolon en la penso ol en la korpo. Tial li forlasis la studon de medicino kaj decidis sin dediĉi al literatura agado.

Dum tiu tempo, li publikigis en la revuo *Henan* eldonita en Tokio kiu propagandis pri nacia demokratia revolucio, siajn artikolojn pri politiko kaj literaturo; li prezentis al la ĉina publiko per tradukoj verkojn de rusaj, orienteŭropaj kaj nordeŭropaj verkistoj, kiuj ekscitas patriotisman fervoron. Kaj en la jaro 1908 li aliĝis al *Guangfuhuj*, organizo kiu propagandis demokration en tiu tempo.

Elreviĝo pri la Burĝa Revolucio de Ĉinio

Post hejmvreveno el Japanio en junio 1909, Lusin sin okupis en instruado en liceoj unue en Hangĝoŭ kaj poste en Ŝaŭhing. Tri jarojn poste, eksplodis la revolucio en oktobro de 1911, kiu renversis King-dinastion. Tiam li kun entuziasmo gvidis siajn lernantojn sur la stratojn por propagandi pri ĝi. Sed la Revolucio de 1911 ne plenumis la taskojn de demokratia revolucio pro neĝisfundeco de la ĉina burĝa

revolucio. Regado de monarkistoj kaj militaristoj anstataŭis tiun de King-dinastio, kio senesperigis Lusin kaj lin dronigis en ĉagrenon. Li silentadis por 6 jaroj sin dediĉante al studo pri antikvaj verkoj, sutroj, kopiaĵoj de gravuritaj surskriboj de antikvaj memorŝtonoj kaj bronzaĵoj k. a. objektoj de la ĉina tradicia kulturo. Sed sub la glacia aspekto de lia vivo, kaŝiĝis multe pli arda flamo de batalo. Li serĉadis kun doloro vojon por savi la patrimon kaj silente observadis kaj sekcedis la diversajn sociajn fenomenojn sub la reacia regado.

Batalanto de Revolucia Demokratio

La venko de la Oktobra Revolucio de Sovetunio en 1917 alportis al la progresema intelektulo de Ĉinio la veron de marksismo. Ankaŭ Lusin vidis en ĝi la "aŭroron de nova erao". En la jaro 1918 li komencis verkadi sub la plumnomo Lusin kaj publikigis en la gazeto *Nova Junularo*, kiu tiam servis kiel organo de la novkultura movado, sian unuan novelon *La Taglibro de Frenezulo*, alte levante la standardon por ĝisfunda forigo de feŭdismo.

En la Maj-kvara Patriota Movado en 1919, Lusin luktadis sub la batala standardo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo por kultura kaj literatura revolucio kaj fariĝis batalanto de revolucia demokratio. En la redakcia komitato de *Nova Junularo*, li batalis kune kun la marksistoj Li Daĝaŭ k. a. kontraŭ la reformisma kaj kompromisa-kapitulaca tendenco de Hu Ŝi, burĝa dekstrema intelektulo.

Eminenta Kontribuo Literatura

Dum la periodo de 1918 ĝis 1925 Lusin verkis ĉ. 30 novelojn, en kiuj Lusin bildigis, kun indigno kaj kordoloro kaj per flegma observo kaj rafina, lakona sed multdira esprimarto, la faktojn de la ĉina kamparo sub duobla subpremado de imperiismo kaj feŭdismo, kaj forte kondamnis la krimojn de la reacia reganta klaso kaj feŭdisma etiko, kiujn li akuzis kaj kontraŭbatalis pro la subpremo kaj ekspluatadoj turmentataj de tragika sorto. Ĉi tiuj noveloj kolektiĝis poste en la novelaroj *Krioj* (1923) kaj *Vagado* (1926).

La alia eminenta kontribuo de Lusin al la ĉina moderna literaturo estas liaj *zaven*-oj, t. e. batalaj mallongaj eseoj, kombinaĵoj de poezio kaj politika kritiko, kiujn Lusin komparis kun ponardo aŭ ĵetlanko uzata por trafi la mortigan punkton de la malamiko. Liaj eseoj verkitaj en la dudekaj jaroj aperis libroforme en la kolektoj "Tombo", "Varma Vento", "Baldakeno", "Daŭrigo de la Kolekto

Baldakeno" k. a. En tiuj eseoj tre klare esprimiĝis la revoluciaj pensoj de Lusin kontraŭ imperiismo, feŭdismo kaj iliaj lakeoj.

Inter la Popolamasoj—Serĉado de Nova Vojo por Batalo

Ekde 1920, Lusin okupis sin per instruado en la Pekina Universitato, la Pekina Altgrada Instruista Lernejo k. a., kaj samtempe redaktis gazetojn. Tiu-tempe, li ne nur kontaktiĝis kun la vastaj amasoj per siaj artikoloj, sed ankaŭ persone iris inter la amasojn de junaj studentoj. Li helpadis la junajn literaturamantojn en teoria studo kaj en verkado kaj organizis novan armeon de la literatura fronto; kaj samtempe laŭ la bezono de sia lekciado, li pretigis la librojn *Historia Skizo pri Ĉinaj Noveloj kaj Romanoj*, *Kolekto de Malnovaj Notoj pri Ĉinaj Noveloj kaj Romanoj* k. a.

Post la Maj-trideka Movado en 1925, la kontraŭ-imperiisma movado en tuta Ĉinio atingis novan kulminon. La 18-an de marto 1926, pli ol tridek mil popolanoj leviĝis en movado kontraŭ la interveno de imperiistoj en internajn aferojn de Ĉinio kaj ilia instigado de enlanda milito en Ĉinio. Ili manifestaciis antaŭ la sidejo de la Aganta Registaro en Pekino kaj trafis buĉadon de la reacia registaro per pafiloj, kun rezulto de pli ol 200 mortoj kaj vundiĝoj inter studentoj-junuloj kaj civitanoj. Lusin fortege riproĉis la tiamajn regantojn—la militaristojn, burokratojn kaj iliajn buldagojn, pro kio li estis persekutata de la registaro de nordaj militaristoj per arestcirkulero. En aŭgusto de 1926, li devis fuĝi de Pekino al Hiamen.

Dum tiu periodo, Lusin faris, kiel li mem diris, "vere mi senĉese sekcedis aliajn personojn, tamen pli multe mi sekcedis min mem sen kompto", klopdante

Lusin (dekstre 3-a) kun pekinaj esperantistoj (1922). La dekstre 4-a estas Eroŝenko.



trovi novan vojon por batalo. Tiu lukto kontraŭ sia propra penso senkaŝe speguliĝis en liaj verkoj, ekzemple en la kolekto de poemoj en prozo *Sovaĝa Herbaro* (jam aperis en esperanta traduko), en la kolekto de skizoj *Matenaj Floroj Kolektitaj dum Vespero*, la kolekto de eseoj *Tombo* kaj la historiaj noveloj *Forflugo al la Luno*, *Forĝado de Spado* k. a.

Al la Revolucia Sudo


La jaro 1926 estis ĝuste la tempo, dum kiu la revolucia armeo kune formita de Kuomintango kaj la Komunista Partio de Ĉinio sin trovis en alta tajdo de venkoj en ekspedicio al la Nordo. Tiam Lusin venis de Hiamen al Kantono, la revolucia centro, kaj eklaboris kiel direktoro de instruaj aferoj kaj dekanato de la literatura fakultato de la Sun Jatsen-a Universitato. Tie li trovis amon kaj subtenon ĉe vastaj junulaj amasoj. Tiam li publikigis kune kun verkistoj de la revolucia literatura rondo "Kreado" la *Deklaracion de Ĉinaj Verkistoj al la Intelektuloj kaj Popolamasoj de Britio* kondamnante la publikan intervenon de la brita imperiismo en la aferojn de la revolucio de Ĉinio.

En la jaro 1927, la dekstra alo de Kuomintango kun Ĉiang Kajŝek kiel reprezentanto perfidis la revolucion kaj lanĉis kontraŭrevolucion politikoŝanĝon; sekve de tio ankaŭ la reakciuloj en Kantono grandnombre masakris komunistojn kaj revoluciajn junulojn. Ankaŭ multaj el la studentoj de la Sun Jatsen-a Universitato estis arestitaj aŭ mortigitaj. Post vanaj klopodoj por savi la studentojn, Lusin forlasis sian postenon kun indigno kaj forveturis al Ŝanhajo.

Tiu ĉi incidento ankoraŭfoje instruis al Lusin per sangaj faktoj kaj leciono. Li vidis propraokule, ke la junuloj dividiĝis en tendarojn revolucion kaj kontraŭrevolucion. La kontraŭrevoluciaj junuloj aŭ faris sekretajn akuzojn kontraŭ la revoluciaj aŭ helpis la policon ilin aresti, kaj la insidemo kaj krueleco, kiujn la junaj kontraŭrevoluciuloj montris kontraŭ la revoluciuloj estis neniom malpli grandaj ol tiuj de la maljunaj. Sekve, en tiutempo la evoluisma penso de Lusin komplete frakasiĝis, kaj iom post iom li ekkredis, ke la estonton havos nur la nove leviĝanta klaso de la proletoj.

En Ŝanhajo

La periodo, dum kiu Lusin loĝadis en Ŝanhajo, estis tiu de plej malfacila sed ankaŭ plej brila intensa batalado el lia vivo. Tiam malfluis la revolucia tajdo kaj Kuomintango faris la t. n. "kulturan sieĝekstermadon" kontraŭ la progresemaj kulturaj agadoj. Dum tiu periodo, Lusin diligente studis marksismon, unuigis progresemajn kaj revoluciajn verkistojn kaj persiste kontraŭbataladis kun literaturo kiel sia armilo. En marto de 1930, fondiĝis en Ŝanhajo la Unio de Ĉinaj Maldekstraj Verkistoj, de kiu Lusin



Lusin, lia edzino Hju Guangping, kaj ilia filo Hajjing (1933).

fariĝis la ĉefgeneralulo kaj standardportisto. Kune kun multaj progresemaj kaj revoluciaj verkistoj, li gvidis, ĝuste interne de la korregiono de la reakciuloj sub treege intensa teroro blanka, la revolucion literaturan movadon kaj la movadon de nova lignogravura arto, plene venkis la atakon kontraŭ la revolucia literaturo fare de reakciuloj kaj starigis la revolucion literaturan kiel la ĉeffluon de la ĉina literaturo tiutempa. Samtempe li ankaŭ partoprenis serion da politikaj bataloj kaj popolamasaj movadoj gvidataj de la Komunista Partio de Ĉinio. Ekzemple, li partoprenis la kreadon de la Unio por Civilaj Rajtoj en Ĉinio en 1933, portis al la Konsulejo de la hitlera Germanio en Ŝanhajo proteston kontraŭ la naziaj perfertoj, partoprenis la Ekstrem-Oriantan Konferencon de la Tutmonda Komitato kontraŭ Imperiisma Milito, ktp.

Ĝuste dum tiu ĉi periodo, Lusin intime amikiĝis kun Kju Kiubaj, unu el la gvidantoj de la Komunista Partio de Ĉinio. Ili kune gvidis la revolucion kulturan movadon, frakasis la reakcian "kulturan sieĝekstermadon" fare de la malamikoj, kaj kune tradukis multajn literaturajn verkojn de Sovetunio, disvastigis kaj eksplikis la marksisman literaturan teorion. Kju Kiubaj sisteme pristudis la eseojn de Lusin, kompilis la libron *Elektitaj Eseoj de Lusin* kaj verkis por ĝi longan antaŭparolon, en kiu li profunde analizis



Lusin kaj gejunuloj.

Lignogravuraĵo de Jang Navej

evoluon de la penso de Lusin kaj sufiĉe taksis la pozicion kiun li okupis en la historio de ideologia batalo. En 1935, kiam Kju Kiubaj estis murdita de la reakciuloj, Lusin kompilis kaj eldonis, spite de sia malsano, liajn postlasitajn tradukojn pri la marksism-leninisma literatura teorio kaj de verkoj de M. Gorkij k. a. sub la titolo *Haj Ŝang Ŝu Lin* (aŭ: *Interpretaĵo Sur la Maro*).

La verkoj de Lusin dum la naŭ jaroj en Ŝanhajo estis kolektitaj en la naŭ esearoj *Trifoje Riĉa je Libertempo* k. a. Ankaŭ la novelaron *Malnovaj Legendoj Nove Redaktitaj*, kies temaron li prenis el legendoj, li kompletigis en tiu periodo.

La eseoj de Lusin verkitaj dum tiu periodo estas miniaturo de tiu tempa socia fizionomio kaj ideologia batalo de Ĉinio. En tiuj eseoj, li registris la naciperfidon kaj kapitulacon kaj kruelan masakradon al kulturlaborantoj fare de la grandbienularo kaj kompradoraro, kaj bildigis la ferocan fizionomion de la diktatoro aganta kiel polica hundo de la imperiistoj-invadistoj kaj la vizaĝon de diversaj lakeoj dependantaj de la invadistoj.

Kiam la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo sukcese finis, en 1935, la Longan Marŝon de 25000 li-oj kaj starigis novan revolucionan bazon en norda Ŝenhi, Lusin tuj gratulis ĝin telegrame kun Maŭdun. Kaj en la jaro 1936, kiam la amasa movado por rezisti la japanan invadon kaj savi la patrolandon disvolviĝis tra la tuta lando, la kulturaj kaj literaturaj rondoj de Ŝanhajo, responde al la alvoko de la Komunista Partio de Ĉinio ĉesigi la enlandan militon, unuanime rezisti la japanan invadon kaj organizi nacidefendan re-

gistarono, memvole malorganizis la Union de Maldekstraj Verkistoj kaj aliajn revoluciajn literaturajn organizojn kaj fondis literaturan organizon de la nacia unueca fronto por rezisti la japanan invadon. Kvankam tiam Lusin estis grave malsana, tamen li aktive subtenis tiujn agadojn celantajn rezistadon kontraŭ Japanio kaj savon de la nacio, kaj publikigis artikolon subtenantan la Komunistan Partion de Ĉinio. Bedaŭrinde, la 19-an de oktobro de la sama jaro pro trolaciĝo kaŭze de multjara pensado kaj longa suferado de ftizo tiu granda verkisto de la ĉina popolo devis forlasi la homan mondon.

Lusin Vivos por Ĉiam en la Koro de la Ĉina Popolo

La tuta vivo de Lusin estas vivo de revolucia batalado kaj de diligenta laborado. Ekde la kuranta jarcento, li aktivadis sur la literatura kampo pli ol 30 jarojn kaj skribis kaj tradukis verkojn ampleksantajn pli ol 7 milionojn da vortoj. Liaj verkoj metis firman kaj solidan fundamenton de la ĉina moderna literaturo, kaj pro tio li fariĝis unu el la literaturaj majstroj de la mondo en la 20-a jarcento. Laŭ statistiko nekompleta, liaj verkoj jam estas nun tradukitaj en pli ol 30 lingvoj tra la mondo.

Lusin estas bona amiko por la progresema homaro kaj entuziasma disvastiganto de la progresema literaturo tutmonda. Dum la pli ol 30 jaroj li transplantis traduke en Ĉinion verkojn kun pli ol 3 milionoj da vortoj de klasikaj kaj modernaj verkistoj de Sovetunio, Germanio, Japanio, Francio, Hungario, Nederlando, Bulgario, Rumanio, Ĉeĥoslovakio, Hispanio, Finnlando kaj multaj aliaj landoj. Krome, li ankaŭ fondis la gazeton *Tradukaĵo*, kiu sin dediĉis ekskluzive al konigado de la monda literaturo, kaj plie li prezentis al eksterlando ĉinajn modernajn lignogravuraĵojn de la 30-aj jaroj.

Dum la nigraj jaroj de reakcia regado, Lusin ne povis libere paroli kaj agi. Libroj de li verkitaj kaj gazetoj de li redaktitaj estis malpermesitaj, kaj li ne povis libere vojaĝi sur la tero de la patrio. La verkoj de Lusin povas eldoniĝi grandkvante en diversaj formoj kaj vaste cirkuli inter la popolanoj de Ĉinio nur post kiam la popolo transprenis la regpotencon. Ne longe post la Liberiĝo, la Popola Registaro fondis memorigajn domojn pri Lusin en Ŝaŭhing, Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono, lokoj kie li vivis kaj batalis, kaj aranĝis memorigajn ĉambrojn ankaŭ en la Hiamena Universitato kaj la Sun Jatsen-a Universitato en Kantono, kie li sin okupis per instruado. Lusin vivos por ĉiam en la koro de la ĉina popolo kaj en tiu de la tutmondaj progresemaĵoj. La eldono de *Noveloj de Lusin* en esperanta traduko, kiu eliros laŭplane en la kuranta jaro, havigos al la progresema esperantistaro pli da ŝanco aprezi verkojn de Lusin kaj koni lian pozicion en la literatura historio de Ĉinio.

Sunleviĝo ĉe la Stepo

— Vizito al la Luobej-a Ŝtatfarmo —

LA ĈAMBRO estas simple meblita, surmure tamen pendas ĉinstila pentraĵo kun titolo “Eterna Verdado”, tre impona kaj kolorriĉa. En la pentraĵo estas du majestaj grandaĝaj pinoj kaj ruĝa suno rondronda, kun fortpleneco montrita en la profunda verdo kaj grandanimeco en la vivpleneco. La dommastro, montrante al la bildo, diris, “Sur nia Luobej-stepo, tia brile ruĝa suno estas videbla ĉiutage.”

Kiam ni atingis ĉi tiun filion de la Luobej-a Ŝtatfarmo en la Norda Dezerto, ĝuste estis printempofino kun la kutima superfluo de la “persikflora akvo”. Ĉe la ĉeffarmo, ni jam sciigis, ke en sia unua jaro de ekzisto ĉi tiu filio jam distingis sin per okulfrapa cifero en laborproduktiveco — pli ol dudek mil ĝin-oj da greno por ĉiu agrikultura laboristo. Ni ankaŭ informigis, ke la kondiĉoj ĉi tie estas tre malbonaj — ĉefe, malfacilo en komunikado kaj malnoveco de la maŝinoj kaj kultiviloj. Per traktoro ni veturis ĉi tien de la ĉeffarmo. La tuttaga balanc-ruliĝado tra kotaj vojoj suferigis nin, kvazaŭ marmalsano, sed la traktoristo diris, ke li tute kontentigis, se la vojo restus en tia sama stato dum la tuta jaro, ĉar foja inundo de “persikflora akvo” faris la filion izolita insulo sur senvoja vastaĵo de inundakvo.

Kiam ni eniris la sidejon de la filia farmo, ekfrapis niajn okulojn vicoj da loĝdomoj kun ruĝaj muroj kaj tegmentoj. La stratoj estas rektaj, glataj kaj borderitaj per nove plantitaj salikoj freŝverdetaj, kiuj, kune kun la ruĝaj domoj, fariĝas alloga bildo. Kun granda intereso ni demandis la sekretarion de la Farma Partia Komitato:

“Kiel atingis tian grandan sukceson?”

“Per tio ĉi,” serene li ridis, etendante siajn dikajn fortajn manojn.

Tuj li detale informis nin pri la konstruado de ĉi

tiu filia farmo. Ĉi tie estis kvar produktbrigadoj kun 227 anoj, el kiuj nur cent dekelkaj partoprenis en la agrikulturaj laboroj, la ceteraj faris flankokupajn laborojn, servis en fundamenta konstruado aŭ en la priservaj laboroj. Koncerne agrikulturajn maŝinojn kaj ilojn, ili havis nur sep traktorojn, ses kombajnojn kaj ses sarkmaŝinojn rekte uzatajn en produktado, . . . sed neniu el ili povis normale funkcii pro longtempa uzado. Kaj la areo de agroj mezuriĝis je kelkdek mil mu-oj.

“Kompreneble ne malmultaj estis la malfacilaĵoj,” li rakontis. Iu eĉ verkis ŝercan versaĵon pri tio:

*Vastegas nia farm-filio,
Malmultas homoj, lamas ĉio.
Malbonas nia maŝinaro,
Kotajo ĉie, glito — falo.*

“Kion ni faris antaŭ la malfacilaĵoj? Mi rakontu al vi interesan epizodon!”

Li daŭrigis, enprofundiĝinte en sia rememoro:

“Je la komenco, ĉi tie estis nur vasta etendaĵo de miroksilo (*myroxydon*), sen vilaĝo, sen hejmoj, nur

Traktoro de la farmejo konkeras la vastan stepon.

Foto de Hinhua



kun la ruinoj restigitaj de la Kontraŭ-japana Unuiĝa Armeo dum la rezistado kontraŭ la japanaj rabistoj. La meĥanikistoj kaj mal-mobilizitoj kiuj alvenis, devis loĝi en tendoj. Nia direktoro estas eksbatalionestro. Ĉirkaŭ-rigardinte tiam la lokon, li kolektis la anojn kaj diris al ili:

“Estas malvarme loĝi en tendoj. Pli bone estas ke ni konstruu kelkajn domojn!” Ĉiuj ekridis aŭdinte tion:

“Bone!” ili respondis. “Sed per kio?”

“Per niaj manoj!” diris nia direktoro. “Ni eklaboru nun, kaj vespere ni jam povos enloĝi tie.”

“Ĉiuj estis mirigitaj. ‘Kie estas la materialoj? La ligno, pajlo, najloj?’”

“Ĉio estas preta. Pajlo? Kelkaj el vi iru falci en la orienta herbejo. Ligno? Dehaku iom da arbetoj jam uzablaj post prilaborado. Kaj ankaŭ najlojn ni havas. Jen!” Kaj li elmontris ses aŭ sep rompitaĵajn hufferaĵojn kaj faskon da dikaj ferfadenoj kiujn oni antaŭe kolektis.

“‘Iom prilabori tiujn ĉi plej bonajn materialojn, kaj la problemo pri najloj estos solvita.’”

Posttagmeze la partia sekretario kondukis nin al la de ili mem konstruitaj maŝinriparejo, greno-prilaboro, legomopeklo, kukofarejo kaj elementa lernejo, infanvartejo. . . . Ni laŭdis kun admiro, “Kia Norda Dezerto? Vere simila al abundejo de agrikulturaj produktaĵoj sude de Jangzi-rivero!”

“Ne,” la sekretario skuis la manon kaj aldonis humure, “Ni nomas ĝin la ‘Armea Grenproduktejo’ — la grenproduktejo de la malmobilizitaj oficiroj kaj soldatoj el la Popola Liberiga Armeo!”

Vespere, ni intencis daŭrigi nian interparolon. Sed neatendita akcidento malhelpis nian planon: la “persikflora akvo” venis antaŭ sia tempo, inundante la solan vojon kondukantan al la ĉeffarmo. La petrolo bezonata por maŝinoj dum la printempa kulturado ne povos esti transportita laŭplane. La partia sekretario iris al urĝa kunveno. Ni enlitiĝis frue kaj dorminte ĝis ĉirkaŭ la deka mi vekigis de bruo en la najbara ĉambro, jen granda jen malgranda. Iu diris:

“Kia damnita vojo! Simple fariĝas putra intesto en la akvo, vere malfacila!”

“Vere! Se ne estos sufiĉa provizo de petrolo, eĉ pli da malfacilaĵoj aperos.”

“Pli multaj malfacilaĵoj? Ne malbone. Kiu el ni ne estas hardita en malfacilaĵoj?” Mi rekonis la voĉon de la sekretario.

Tuj post la elkrepuskiĝo mi vekis miajn kolegojn por rigardi la sunleviĝon ĉe la stepo.



La nova generacio de la farmejo.

Foto de Hinhua

Ekstere en la matena nebulo estis tre kviete. Starante sur monteto, ni rigardis atente al la malproksimo. Oriente, la ĉielo komence estas blueta kun skvamoj da nuberoj: pli poste aperas ruĝiĝo, kiu simetrie supreniĝas iom post iom, tinkturante la nubojn per rozaj koloroj kaj baldaŭ poste ĉio jam brilis en ruĝo oranga. . . .

“Tuj leviĝos la suno!”

“Marŝu pluen! pluen!” laŭta marŝkanto interrompis mian diron. Ni turnis niajn kapojn dekstren al la malantaŭo. Longa kolono de homoj venis en nia direkto. Kun flavaj vatitaj jaketoj kaj subŝtofitaj pantalonoj alte refalditaj, ili vadis tra la glacia “persikflora akvo”, portante pezegajn petrolbarelojn. Ili almarŝas grandpaŝe, kun la partia sekretario ĉe la kaploko.

Ni iris al ili, dirante, “Kiom frue vi leviĝis!”

La sekretario ridis, “Mallertajo! Se la vojo estas ne irebla por veturiloj, do ni devas ŝultropoti la petrolon. Tio ankaŭ helpas al solvo de la problemo. Sed. . . .” Li eklevis siajn dikajn brovojn, “Oni diras, ke la vojo estas formita per irado de homoj.” Tion dirinte, li subite montris al la oriento:

“Rigardu, rigardu!”

Ni tuj turnis nian kapon al la direkto. Granda duonronda globo fajrruĝa estis malrapide leviĝanta. Tiam, la blueta kampo en trembrilo de la rospertoj estis prilumita kvazaŭ akvo ondanta en oraj radioj. La ruĝa suno aspektis pli brila en tia fono. La rozaj nuboj jam fariĝis bunta brokato. Subite la suno eksaltis, plene sin montris super la horizonto kaj tuj la universo pleniĝas je hela lumo.

Pri la Kultura Interŝanĝo

ESTIS la kvara horo en la mateno de la 2-a de februaro kiam la delegacio de ĉinaj verkistoj atingis Kajron. En la malvarma vento de frua printempo, ni subiris de la aeroplano, malvaste volvante nin en la mantelo, renkonte al la homamaso kiu svarme alvenis nin bonvenigi. Kiu prezentis grandan bukedon al mi estis juna virino, spiranta delikatecon kaj elegantecon el inter siaj longaj brovoj kaj belaj okuloj. Ŝi ekparolis en tute perfekta kaj flua pekina idiomo. Ŝi diris ke ŝia nomo estas Tomader Torki kaj tiu de ŝia edzo Heba Enayet, kaj ke ili ambaŭ studis en la Centra Akademio de Belartoj kaj loĝis en la bela urbo Pekino por kvin jaroj; kaj montrante araban junulon salutantan al la ĉinaj gastoj en la homamaso, ŝi diris: "Jen, tiu estas Heba." En la atendejo regis varma amikeco kaj vigla babilado kaj ridado, kaj nia interparolo baldaŭ estis interrompita.

. . . . En la tagoj de mia restado en Kajro, mi ofte pensis pri la juna paro de pentristoj, sed mi ne havis ŝancon ilin revidi.

En la tago de inaŭguro de la Konferenco de Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj ni estis invititaj al la Galerio de Moderna Arto por rigardi la Konkursan Ekspozicion de Pentraĵoj kaj Skulptaĵoj de la Unuigita Araba Respubliko. En la densa arbombro de la Galerio, mi subite vidis en la brakoj de vartistino knabineton en helkolora vesto, sur kies kolo pendis kolĉeno kun ora pendajo surhavanta la ĉinan ideografiaĵon "fortuno". Mi iris el la homa fluo al la knabineto kaj prenis ŝian manon. Ŝi tute ne timis fremduon kaj rigardis min ridetante per turniĝantaj nigraj okuloj. La vartistino diris kun rido: "Ŝi estas la filino de la gepentristoj Heba kaj Tomader. Vidu! Tie en la bunta pavilono, estas la ekspozicio de ŝiaj gepatroj, ĉu ne?" Mi rapide iratingis la homan fluon kaj eniris la buntan pavilonon, kie pendis dense sur la muroj akvaleraj pentraĵoj ĉiuj pri ĉinaj vidaĵoj. Jen junulino kun du harplektaĵoj vektportanta akvositelojn, jen kamparano sin klinante plantas rizplantidojn en la teraskampo plena de akvo. . . . Vere riĉa kolekto de belaj pentraĵoj. Se mi ne vidus apud mi la vizitantojn el diversaj landoj de Azio kaj



La aŭtorino Binghin (meze), la japana verkistino Macuoka Joko (dekstre) kaj egipta ĵurnalistino.

Foto de Hinhua

Afriko, kaj ne aŭdus la parolojn en iliaj respektivaj lingvoj, kiujn mi ne komprenis, mi pensus, ke mi estas en ekspozicio de ĉinaj pentristoj okazigata en la parko Bejhaj aŭ Sun Jatsena en Pekino. Tiam, akompanante grupon da vizitantoj, Tomader pasis preter mi. Kun granda peno mi sukcesis enpremiĝi en la homamason, sed povis nur diri al ŝi unu frazon: "Mi vidis vian filineton, vere aminde. . . ." Ŝi nur ridetis kaj diris en rapido: "Ŝi naskiĝis en Ĉinio, nomata Malgranda Ruĝo. . ." kaj ŝi estis jam forportita eskortate de la homamaso al granda vitrino, en kiu elmontre kuŝis ĉinaj pentriloj, por fari klarigon al la spektantoj. Mi aŭdis la laŭdon de la aliaj ke iliaj pentraĵoj kombinas la karakteron de la ĉina klasika pentraĵo kun tiu de la egipta antikva pentrarto, kaj kreis sian apartan stilon. Mi devas konfesi ke mi estas laiko por pentrarto, sed mi ŝatas iliajn pentraĵojn, kiuj vekas ĉe mi tre intensan senton de korvarmo kaj inĝimeco.

Post la fino de la Konferenco, ni elpremis tempon por viziti la Kajroan Muzeon. Nin akompanis ĉina studento Hua studanta en Egiptio. Depost nia surpaŝo en la veturilo, tiu junulo erudiciulaspekta kun dikaj okulvitroj, senĉese kaj interese rakontis al ni pri la antikva kulturo egipta. Li estis tiel fervora

kaj ebria en sia rakontado ke li aspektis pli kvazaŭ li estus reĝanta en sia cerbo, unu post alia, la bildojn pri la brila antikva kulturo egipta ol faranta klarigojn al aŭskultantoj. Malfeliĉe, la Muzeo devis fermiĝi pli frue ol ordinare en tiu tago, ke ni havis nur tridek minutojn por trarigardi la plej antikvan kulturon de la mondo de ses mil jaroj. Kun rezigno, ni povis nur rapidigi la paŝojn kaj urĝeme preterpasis la ŝtonajn pordegojn alte starantajn, la grandajn ŝtonajn ĉerkojn transverse kuŝantajn kaj la vicigitajn grandajn ŝtonajn statuojn. La junulo, kun petega rigardo, karesis preskaŭ ĉiujn pecojn ŝtonajn, klarigante al ni: "En la 3312-a jaro antaŭ Kristo. . . ." Kaj la gardisto de la Muzeo postvokis: "Bonvolu rapidi! La Muzeo fermiĝos en kvin minutoj!" En tiu tago, neniuj kontente pririgardis. Ĉiuj bedaŭris dum forlaso de la Muzeo por surpaŝi la veturilon. Precipe la junulo, kiu ĉiam penseme rigardis eksteren tra la fenestro dum la revojaĝo, aspektis kvazaŭ li dirus al si mem: "Vane ni faris la viziton!"

Tamen, mi ĝojis tutkore. Kultura interŝanĝo devas esti efektiva de tia junulo kiu fervore amas la amikan landon. Egiptio, Ĉinio kaj Hindio estas la luliloj de la kulturoj en la mondo. Niaj prapatroj transpasis montojn kaj akvojn kun multaj malfacilegoj por malfermi por ni vojon de kultura interŝanĝo, kaj ni, renversante la imperiistojn kaj la koloniistojn kiuj baras la kulturen interŝanĝon, be-



Heba (la 4-a de maldekstre) kaj lia edzino Tomader (la 2-a de maldekstre) ĉe sia ekspozicio de pentraĵoj okazigita en Pekino antaŭ la foriro de Ĉinio.

zonas milojn da tiaj gejunuloj kiaj la pentristoj-geedzoj Tomader kaj Heba kaj la ĉina studento Hua por "daŭrigi la komencitajn laborojn kaj malfermi estontajn perspektivojn", kaj por efektivi grandan aferon kiun ne povis niaj antaŭuloj.

* Ĉina fama verkistino, kiu ĉeestis kiel membro de la ĉina delegacio la Konferencon de Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj okazigitan en Egiptio ĉijare.

(Daŭrigo de p. 239)

Por Nova Fakrondo de "Graĵoj en Vento"

Instigite de la sukceso de "Graĵoj en Vento" kaj responde al la alvoko de ties direktoro, ke oni ekagu en la naturscienca kaj teknologia kampoj, S-ro Alberto Barrocas (adr: Yaguari 2248, Ap. 3, Montevideo, Urugvajo) faris jenajn proponojn:

"La sciencistoj-esperantistoj povos publikigi rekte la rezultojn de siaj esploroj en Esperanto;

"La aliaj esperantistoj devos serĉi en la sciencaj medioj de siaj landoj aŭ urboj, taŭgajn publikigindajn esploraĵojn, kaj traduki ilin esperanten;

"En fiksita dato, la partoprenantoj sendos fiksitajn kvanton da kopioj (ekz.: 50, per mimeografo) al la subskribanto (proponinto);

"Li (la proponinto), per la ricevitaĵoj, eldonos gazetojn enhavantajn 1 kopion el ĉiu partoprenanto;

"Ĉiu partopreninto ricevos 1 (aŭ pli) ekzemplerojn;

"Oni petas al la samideanoj interesitaj, *tuj* skribi al la subskribanto (proponinto), ĉu ili estas pretaj kunlabori. Se kuniĝos sufiĉa nombro, li indikos al ĉiu daton, kvanton da kopioj, kaj aliajn necesajn detalojn por la unua eldono;

"Se la rondo sukcesos, kaj poste aperos pliajn kunlaborantojn, oni povos disbranĉigi ĝin laŭ pli spe-

cialigitaj fakoj, ekzemple: kemia, elektroteknika, biologia rondoj."

Jen aprobinda iniciato. Ekagu la sciencaj-esperantistoj.

Nova Eldono de "La Marvirineto" de Andersen

Kredeble multaj samideanoj jam legis la ĉarman fabelon de Andersen pri la mara virineto, tradukitan de Zamenhof. Nun okaze de la 47-a Universala Kongreso en la naskiĝ-lando de la mondfama verkisto, la Eldonejo KOKO preparas luksan eldonon de la fabelo en nova esperanta traduko fare de s-ro Ib Schleicher el la dana originalo. La libreto estos elegante bindita kaj riĉe ilustrita per koloraj bildoj. Prezo; 15.-d kr. = 30 steloj. Mendebila ĉe Eldonejo KOKO.

Van Lajming, Van Guĉan kaj Van Ĉaŭĉen:

Ĉinaj Pentritaj Filmoj

en la Pasinto kaj Nuntempo

PAROLANTE pri la pentritaj filmoj de Ĉinio oni ankaŭ ofte ekmemoras nin, Van-fratojn. Ĉar en la malnova Ĉinio, ni ja venis pli frue en la kampon de tiu ĉi arto.

Ni memoras ke antaŭ pli ol tridek jaroj kiam ni tri fratoj komencis labori super la belartaj filmoj, la sorto de pentritaj filmoj estis deciditaj tute de la kapitalistoj. Ofte nin trafis tia okazaĵo, kiam la scenaro estis decidita, eĉ jam parte pentrita, la mastro subite ordonis ke ni ĉesigu la laboron. Por daŭrigi nian vivon de artokreado, ni iris de pordo al pordo por peti helpon de la filmoproduktejoj, grandaj kaj malgrandaj, sed rifuzon ni ricevis milfoje. Kiam la filmoj estis finfaritaj kun malfaciloj, aperis ne longe antaŭ la publiko, ili estis tuj elpuŝitaj de la usonaj pentritaj filmoj, kiuj inundis tiutempe nian filman merkaton. Post duonjaro aŭ plejmulte unu kaj duono da jaroj ni certe devis plenumi la “admonon” de la mastroj “bonvolu trovi por vi pli favoran lokon”. Tiam ni dronis tutan tagon en zorgoj pro laboro, ĉiutagaj pano kaj aliaj necesajoj kaj edukelspezoj de niaj infanoj.

Eble iuj ankoraŭ memoras la longan pentritan filmon, aperintan en 1941, kun temo de mitorakonto *Princino de Fera Ventumilo*, kiu estis la lasta pentrita filmo de ni produktita en la malnova Ĉinio. Kvankam tiu ĉi filmo rikoltis grandan sukceson en prezentado, tamen la mastro rigardis la produktadon de tia filmo kiel aferon malfavoratan, opiniante ke oni devas jam ĉesi post la gajno kaj ne plu volis produkti similajn. Post kiam *Princino de Fera Ventumilo* estis filmita, nia amata laboro fine estis interrompita, kaj neniel povis esti daŭrigata. La grupanoj, kiujn ni edukis dum multaj jaroj disiĝis pro sia vivopano, ĉiu bedaŭre forlasis sian penikon kaj disiris al aliaj laboroj. Ni fratoj ne plu povis persisti en nia amata laboro kaj devigite ŝanĝis niajn okupojn. Nur post la fondiĝo de la nova Ĉinio, nia dumviva espero efektiviĝis kaj ni revenis unu post alia al la ŝatata okupo.

Nun la pliaĝa frato — Van Lajming — estas la reĝisoro de pentrita filmo, la pli juna frato — Van Guĉan — reĝisoro de papertranĉaĵo-filmo, la plej juna frato — Van Ĉaŭĉen — ĉefteknikisto kaj reĝisoro de pupofilmo. Ni ne nur okupas nin pri nia amata laboro de belartaj filmoj, sed ni ĉiuj ankaŭ havas

bonan okazon por pli disvolvi niajn apartajn kapablojn, sekve de la disvolviĝo de la belartfilma entrepreno en nova Ĉinio.

Antaŭ ol ni partoprenis en la laboro, nin ankoraŭ ĝenis la dubo ĉu niaj apartaj kapabloj povus plene disvolviĝi en la nova socio? Poste, la fakto diris al ni, ke tiu ĉi maltrankviliĝo estas tute ne necesa. Ekzemple, la pliaĝa frato, partopreninte la laboron nur kvar tagojn, ricevis jam taskon por produkti pentritan filmon kaj de tiutempe li jam direktis unu filmon post alia ne malmulte da pentritaj filmoj, multaj el kiuj kiaj *Rakonto pri Pentraĵo sur Muro* ktp, akiris certajn sukcesojn. En la frua printempo de tiu ĉi jaro li komencis direkti longan pentritan filmon *Ribelo kontraŭ la Ĉielo* el mito.

Ni devas diri, ke estas tre ĝojinde por ni, ke la populara mito *Ribelo kontraŭ la Ĉielo* jam prenis sur sin ankaŭ la formon de pentrita filmo, kion ni ege deziris sed neniel sukcesis en multaj jaroj. Estas tute nature ke tiu ĉi afero denove

La tri fratoj: (de maldekstre). Van Ĉaŭĉen, Van Lajming kaj Van Guĉan.





Van Lajming interkonsiliĝas kun redaktorino pri la redaktado de iu filmo.

rememorigis al ni la situacion en kiu ni produktis la pentritan filmon *Princino de Fera Ventumilo* en la malnova socio.

Ribelo kontraŭ la Ĉielo kaj *Princino de Fera Ventumilo* ambaŭ estas elektitaj el la ĉina romano — *Pilgrimo al la Okcidento*. Sed ĉar tiuj ĉi du filmoj estis produktitaj en malsamaj socioj, tial la situacioj, en kiuj ili sin trovis, diferencas unu de la alia kiel tero de la ĉielo.

Kiam ni faris la filmon *Princino de Fera Ventumilo*, la mastro celis nur profiton. Dum nia filmado, ni timis ke la mastro suferus malprofiton pro la filmo. Por doni profiton al la mastro, la aplikon de multe da proponoj pri arto ni devis rezigni kun larmoj en la okuloj, por ne paroli pri ekipaĵoj kaj personaro. Eĉ en tia stato, la minaco de “ĉesigu pentri” estis ĉiam pendanta sur la lipo de la mastro. Kiam la filmo estis fine preta, la mastro gajnis monon, sed nia “manĝopelvo estis rompita”.

Nun, en filmado de *Ribelo kontraŭ la Ĉielo* por altigi la artan kvaliton de la filmo, la film-produktejo provizas nin per ĉiuj eblaj kondiĉoj. Antaŭ la komenco de la filmado ni veturis kelkmil

P. Antokolskij:

Kio Estas Popola Ĉinio?

Kio estas popola Ĉinio, demandis vi min?
La jarmiloj, plenplenaj da mortoj, naskiĝoj kaj nuptoj,
infuzintaj en homa vejnar', kiel vino fortega;
la sescentmilionaj popoloj, sur la ŝultrojn levanta monte-
gojn,
disŝovanta riverojn,
konstruanta la digojn, ke ne plu okazu inundoj, —
tolerema, kuraĝa kaj juna,
por feliĉo naskita popolo.

Kio estas popola Ĉinio?
Ruĝa flago kun arda ĉevalo,
kiu flugas al blua foraĵo
en la maro — grenkampo,
verdanta pro riz' kaj tritiko;
veturiloj, puŝ-ĉaroj kaj ĉaroj denove
kaj potencaj ŝarĝ-aŭtoj,
velo-rikŝoj maljunaj kun pecoj da fera minaĵo,
en vilaĝ' elfosita.

Kio estas popola Ĉinio?
La eterna, denaska ĝojego de ĉiz', gravurado,
de muldado kaj hardo en fajro,
la majstreco de tuĉo-pentristoj,
la degelo de nuboj-plumaroj
sur silka teksita pejzaĝo,
la vizaĝoj de la porcelanaj ridantaj idoloj,
kaj la maskoj ruĝbarbaj
sur scenej' de opero;


la kant' de pekinaj studentoj,
dum feri' en kampar' laborantaj;
kaj la drako orita, fluganta sur aerostatoj —
he, rigardu!
ĝi firme kroĉiĝis, povrulo,
Al kolon' telegrafa kroĉiĝis
Jen la tuta placego aplaŭdas, infanoj ridegas!
Kaj nenio finiĝas sur nia planed'!
Ĉio estas movado.
Kaj kirlo.
Kaj ritmo ekstreme rapida.
Laborulaj amasoj severe marŝadas
preter glora tribun',
kaj Maŭ Zedong salutante etendas la manon, —
Kiom estas da ili ĉi tie —
jen la ĉejoj en sportaj kulotoj,
kaj la negroj el la malproksima Sudan',
la germanoj per “cejsoj” klakantaj —
kiom, kiom da ili sur tiuj tribunoj,
de la kvin kontinentoj senditoj!
Ili bone komprenas ja ĉiuj, ke la historio
apud ili, nun estas kreata.

Kio estas popola Ĉinio, demandis vi min?
Kaj kiu do vi estas por demandi?
Ĉu en la kvardek kvina kaj la kvardek naŭa ne vivis vi?
Kaj ĉu apud la ronda tableg' de venkintoj
dum komenc' de la justa erao ne estis vi?
Do rigardu vi rekte al ardaĵoj fajrujoj,
kie sunoj naskiĝas, — ne timu!
Nu, kaj se vi blindiĝos — vi mem estas kulpaj,
do restu vi blindaj — vi, malfeliĉuloj!

El la rusa: N. Ŝtejnberg

li-ojn al Pekino, k. a. kune kun la ĉefaj laborantoj por "trovi instruantojn, interkonsiliĝi kun amikoj" kaj kolekti materialojn. Ni vizitis la Imperiajn Pala-cojn kaj multajn muzeojn, rigardis la prezentadojn pri la sama mito fare de diversaj oper-specoj kaj invitis specialistojn kiuj sukcesas en sia faklaboro diskuti kun ni pri koncernaj apartaj temoj. Kiam ni renkontis malfacilojn dum filmado, ni tuj povis akiri solvon. Rilate al la ĉiutaga vivo ni estas pri-zorgataj ĝis ĉiuj bagateloj.

Koncerne la papertranĉaj-filmojn, kies faradon direktas la plijuna frato, oni eble sciuz, ke ĝi estas nova speco de belarta filmo el sukcesa kombino de la bonaj esencoj el la tradiciaj popolaj artoj de Ĉinio, nome, la ombro-dramludo*, paper-tranĉaĵo, ktp. kun



Van Guĉan studas kun junuloj pri ombrodramludo.

la truko aplikata en kinofilmado. Ni longe deziris alpreni en la belartan filmon la belegan popolan arton de Ĉinio. Tion sciinte la popola registaro tuj nin subtenas energie. Van Guĉan kaj parto de la artlaborantoj estis senditaj al Hi-an, Hunan k. a. por studi ombro-dramludon kaj pupo-ludon, kaj ankaŭ al Maji-insulo k. a. por kolekti materialojn. Post ilia reveno al la filmofarejo, la gvidanto tuj organizigis sektion por prova produkto de papertranĉaĵo-filmo. Post multfojaj eksperimentoj kaj elspezinte multe da mono, la produkto tamen ne sukcesis. Nia gvidanto plurfoje nin kuraĝigis kaj konsolis nin, dirante, ke ne estas grave elspezi iom da mono, por fari eksperimenton elspezo de mono estas ja necesa. Samtempe li transpostenigis al ni kompetentajn kadrojn el la fako de pentrita filmo por nin helpi. Tiel finfine naskiĝis la papertranĉaĵo-filmoj.

En la vespera kunveno por celebri la naskiĝon de la unua papertranĉaĵo-filmo, okazinta en 1958, Van Guĉan kortuŝiĝis ĝis larmoj. Nun li estas la reĝisoro de la filmoj *Gu Bagie Manĝas Akvo-melonon*, *La Knabo Fiŝkaptanta*, ktp. kiuj ricevis laŭdojn de la en- kaj eksterlandaj spektantoj. Antaŭ nelonge li finis la laboron de la papertranĉaĵo-filmo *Ginseng**-infano* kun riĉa gusto de mito.

Farinte nur tre malgrandan kontribuon al la popolo en la film-entrepreno, jam ni estas superŝutitaj per tiom da honoroj de la popolo. Nia pliaĝa frato estas plurfoje elektita kiel popola reprezentanto de Ging-an-distrikto en Ŝanhajo ekde 1956. La aliaj du fratoj malpli-aĝaj estas ambaŭ elektitaj kiel avangardaj laborantoj. La plej juna frato ankaŭ ĉeestis invitite la tutlandan kongreson de la elitoj el kulturaj kaj edukaj rondoj.

Nun, la Ŝanhaja Produktejo de Belartaj Filmoj jam estas filmofarejo kun kelkcent laborantoj. Dum la lastaj jaroj ĝi produktis multe da bonaj filmoj, kiuj ricevis entuziasmajn aplaŭdojn de la spektatoroj. Kelkaj en la filmoj eĉ gajnis premiojn en la Internacia Filmo-festivalo. En la komenco de la lasta jaro sukcesis provprodukto de filmo de ĉinstilaj pentraĵoj, la unika en sia speco. Precipe nin ĝojigis la afero ke en la Ŝanhaja Instituto de Filmarto establiĝis en 1959 la fakultato de pentrita filmo, kie junaj artistoj estas sisteme edukataj por daŭrigi nian laboron.


* *Dramludo per surekranaj ombroj, kiujn oni produktas per marionetaj figuroj el duondiafana ledo.*

** *Panax Ginseng.*

Van Ĉauĉen direktas la fotografiston en filmofotado.



Ribelo kontraŭ la Ĉielo



La Simi-reĝo iras al la palaco de la Drakreĝo de la Orienta Maro por pruntepreni batalilon.



Sun Vukong revenas kunportante la magian pinglon, pro kio ĉiuj simioj ĝojkrias.



Sun Vukong ŝercas kun la generaloj dum vizito al la Ĉiela Palaco.

LA SCENARIO de la pentrita filmo *Ribelo kontraŭ la Ĉielo* estas redaktita laŭ rakonto el la ĉina klasika mitologia romano *Pilgrimo al la Okcidento*. La unua el la du partoj de la filmo jam eldoniĝis, prezentiĝis enlande kaj akiris specialan premion por mallonga filmo dum la 13-a Filmofestivalo en Karlovy Vary. Jen mallonge pri ĝia rakonto:

Post sia apero en la mondo, Sun Vukong (Aŭ Simio Sun) ellernis multajn mirindajn kapablojn: sin ŝanĝi en 72 diversajn formojn, transflugi 108,000 liojn per unu sola transkapa salto, ascendi la ĉielon aŭ eniri la teron laŭ sia plaĉo. Li kondukis ĝojoplenan vivon kun sia granda rondo de simioj en sia Monto de Floroj kaj Fruktoj kaj Kaverno kun Akvokurteno. Iun tagon, ekĝenis lin la zorgo, ke mankas al li taŭga armilo por defendi sian kavernon. Iu maljuna simio konsilis, ke li vizitu la Drakreĝon de la Orienta Maro por tian pruntakiri, kaj li forprenis je miro de la mara reganto la Markvietigan Magian Pinglon, kiu povas esti grandigita

aŭ male laŭ ordono. Pro tiu perdo, la Drakreĝo plendis al la ĉefdio Jad-imperiestro en la Ĉiela Palaco, kaj tiu ĉi tre indigniĝis kaj ordonis aresti kaj alporti la simireĝon. Tiam la maljuna dio Tajbajginhing konsilis, ke oni allogu kaj lokigu lin en la Ĉiela Palaco per malgrava ofico, tiel ke li ne plu faru malordon ekstere. La imperiestro akceptis tiun konsilon kaj donis al Sun Vukong la oficon de ĉevalbredisto. Sed poste la Dio de Ĉevalbredado sin tenis tre aroganta kontraŭ li kaj postulis de li subaĉeton. Tiam li kolere trabatis sian vojon tra la Suda Ĉielpordego kaj reiris al sia monto. Li alten hisigis la standardon kun la surskribo "Kitiandaŝeng" (Sanktulo Egala al la Dioj) por kontraŭstari la Jad-imperiestron. Tiu ĉi sendis sian generalon Ĉielduko Li kun granda armeo da soldatoj kaj generaloj por ekstermi la ribelantojn, sed ili estis terure venkitaj kaj repelitaj.

Inter la popolamasoj, Sun Vukong prezentiĝis kiel heroo kun saĝo kaj sagaco, mirindaj kapabloj, eksterordinara kuraĝo, mal-

timo al potenculoj kaj forta justamo. La filmo sukcese bildigis tiun ĉi heroan figuron kun aspekto homosimila, sagaco de simio kaj mirindaj kapabloj de dio. Li surportas, en la filmo, pale flavan jaketon, ruĝan pantalonon, mallongan jupon el tigra felo kaj smeralde verdan tukon ĉirkaŭ la kolo. Li sin movas vikle kaj rapide, kun la brilanta magia stango (t. e. la antaŭa Markvietiga Magia



4. La maljuna dio Tajbajginhing donas konsilon al la Jad-imperiestro.

Pinglo) en la mano kaj briloj en la okuloj — vera bravulo. Tamen lia figuro devas esti ne tute identigita kun tiu de la homo, alie lia karaktero malharmoniiĝus kun sintenado de la simioj en sia monto. Rilate al tio, oni donis sufiĉan atenton kaj priskribis la facilmovecon, spritecon de Sun Vukong per pluraj epizodoj. Ekzemple, kiam li eniris la Ĉielan Palacon por ricevi oficon, li ŝerce tiklis la generalojn kaj oficistojn, vidante ke ili staras en du vicoj kvazaŭ statuoj el ligno aŭ ŝtono. Kaj kiam li ricevis uniforman kostumon pro la enoficiĝo, li metis la du “flugilojn” de sia oficista ĉapo sur la kapon de la maljuna Tajbajginhing, ke tiu ĉi kvazaŭ ekhavis azenajn orelojn. Tiaj detalaj priskriboj reliefigis la karakteron de Sun Vukong.

Krome, la filmo konkrete prezentis ankaŭ la mirindajn kapablojn de la heroo: ŝanĝi sian hareton en kion ajn li volas; ascendi la ĉielon kaj eniri en la maron laŭ sia bontrovo. Dank’ al siaj mirindaj kapabloj li rompis la ordon kaj kvieton en la Ĉiela Palaco, fiaskigis la intrigon de la dia kortego por lin jungi kaj je la fino venkbatis ĝian armeon ce-

lantan subpremi lian ribelon. Ĉio ĉi tio faris la filmon interesa kaj por la infanoj kaj por la plenkreskuloj.

Por ke la filmo havu fortan etoson mitologian, ĝiaj fonoscenaĵoj alprenis guston de dekoraciaj desegnoj kaj de klaraj linioj kaj de nebuleca konturo. Al ĉefaj partoj de la desegnoj oni donas atente ĉiujn detalojn per linioj, kaj la akcesorajojn oni prezentas per nebulaj strekoj, ke ili aspektu kvazaŭ scenoj de mitologia iluzio. En sia komenca parto, la filmo prezentas al ni la pitoreskajn de la Monto de Floroj kaj Fruktoj kaj Kaverno kun Akvokurteno tiel bela, ke ĝi impresas kvazaŭ lando de feoj aŭ edeno surtera. La palaco de la Drakreĝo kun siaj pentritaj traboj kaj fostoj en la trembrilantaj oraj ondoj, la tronhalego de la Ĉiela Palaco orbrilanta kaj aliaj pejzaĝoj duonkaŝitaj en ŝvebantaj nuboj, vidiĝis kiel feomondo alia ol tiu de la homoj. En aranĝo de la scenaĵoj, oni aplikis multajn tradiciajn karakterizajn al la ĉina belarto kaj tiel donis al la filmo etoson de la ĉina nacia stilo, riĉigis ĝian guston de mitologia iluzio kaj faris ĝin tre ŝatinda.

5. Li metis la du “flugilojn” de la oficista ĉapo sur la kapon de la maljuna Tajbajginhing.

6. Sun Vukong kolere insultas sian superulon tro arogantan kaj postuleman.

7. Sun Vukong reiris al sia monto, hisigis la standardon kun la subskribo “Sanktulo Egala al la Dioj” kaj trejnas simi-armeon.


8. Ĉielduko Li suferas malvenkon.

9. Dum la batalado kun la ĉiela dio Nuoĝa, kiu prenis sur sin la formon de tri-kapulo kun ses brakoj, la simireĝo trioblis.


5.




6.



7.



8.



9.

Ĝang Jongŝoŭ

Geniulo de Papertonda Arto

IUN MATENON en la sezono, kiam konkure pompas diversaj floroj, ni vizitis la maljunan artiston de papertondado — Ĝang Jongŝoŭ kiu praktikis tiun arton jam por kvindek jaroj.

La maljunulo varme akceptis nin kaj kompleze prezentis al ni propramane bonodoran teon. Dum la interkomplimentado ni rigardis al tiu ĉi fame konata papertranĉa majstro kaj lia loĝejo. La ĉambro estis malgranda, sed plaĉa. Sur la fenestra breto staris florpoto de pompe floranta orkideo kiu plenigis la ĉambron per sia parfumo. Tre nature nia paroltemo turniĝis al lia papertonda arto. Li transdonis al ni la antaŭnelonge eldonitan albumon *Kunfloro de Cent Floroj*, kiu estis ĝuste ĉe lia mano, kaj komencis babiladi gaje kaj verve.

La albumo de papertondaĵoj de cent floroj havas kovrilon dekoritan per peonio, la reĝo de la floroj. Malfermite la albumon, ni trovis sur la unua paĝo poemon propramane skribitan de la fama ĉina poeto Guo Moĵuo:

*Jangĝoŭ-a artisto Ĝang Jongŝoŭ
Cent florojn scipovas eltondi
magie.*

*Jen vidu: sezonoj ŝanĝiĝas sub
lia tondilo,*

*Ekblovas la vent' printempa jam
ĉie.*

La postaj bildoj kondukis nin inter diversajn florarojn, kies trajtoj kaj karaktero estis vive prezentitaj sur la papero. Paralele al la poemaro *Kunfloro de Cent Floroj* verkita de la nomita poeto, Ĝang uzis ses plenajn monatojn por eltondi cent kaj unu malsamajn florspecojn.



La vizitantoj absorbiĝis de la majstra arto de Ĝang Jongŝoŭ.

Malfacila Vojo Trapasita

La papertonda arto de Ĝang-familio estas heredita. Ĝis la kvina generacio ĉe Jongŝoŭ, kiu elkreskinta el tiu familio kun arta tradicio, ekamis la papertondan arton jam de sia infanaĝo. Sed lia patro ne permesis al li lerni ĝin, opiniante ke papertondado estas metio tute "malalta". Sekve li povis lerni papertondadon nur ŝtele. Iam en la aĝo de ok jaroj, li provis tondi la "dion de long-viveco", lia tondaĵo neniom similis al la kutima figuro. Li do tondis kaj retondis pli ol 50 fojojn, ĝis li fine sukcesis. Estante dekdujara, pro la malfacileco de la vivo, li jam devis vagadi ĉien svingante bronzan sonorileton por sin vivteni per papertondado, kun pakajo kaj ligna kesto sur la dorso. Migrante en vento kaj pluvo, li plensate gustumis ĉiajn malfeli-

ĉaĵojn kaj ĉagrenojn de la vivo jam de la juneco, tamen tio ankaŭ plivastigis lian vidkampon kaj ebligis al li ekkoni la belecon de la naturo kaj ĝui la vidon de multaj pitoreskaj pejzaĝoj, maloftaj vidaĵoj, raraj herboj kaj floroj. Tial estas ne mirinde ke la maljunaj pinoj kiujn li eltondis estas ĉiam tiel vivplenaj kaj majestaj, kaj ties branĉoj kvazaŭ svingiĝas pro la alblovo de la monta vento kaj la muĝado de pinaro estas malklare aŭdebla. Sed en la malnova socio tiu ĉi eksterordinare talenta artisto tute ne ricevis la meritatan respekton. Anstataŭ nomi lin per lia nomo, oni simple nomis lin "Juna Ĝang la Tria" aŭ "la Variolulo Ĝang la Tria". La papertondaĵoj de la Variolulo Ĝang la Tria, estas bone konataj inter la kamparaj virinoj en Jangĝoŭ, Giangdu, Luhe, k. a. lokoj de Norda Ĝiangsu-provinco.

Kiu ajn prenonta bofilinon por sia filo aŭ edzinigonta sian filinon nepre invitas lin papertondi kelkajn tagojn. Li povas tondi diversajn desegnojn por kapkusenoj, rubandoj, surbrustoj* kaj ŝuoj. Kiam eksonoris lia bronza sonorileto kaj ekfajfis lia bambufluto, oni tuj sciis ke alvenas la papertondisto Variolulo Ĝang la Tria. Tage li kolportis sur la stratoj kaj vespere li tondadis solece sub lampo ĝis profunda nokto.

Iun fojon li estis vokita de filino de bienulo por papertondi en ŝia hejmo. Tamen vidinte lin en sia salono, la bienulo tuj elpelis lin kriegante: "Kia impertinento! Vi papertondisto kuraĝas sidi en la salono!" Tiajn insultojn li ofte spertis, kio fojon post fojo kreskigis en lia koro malamon kontraŭ la reganta klaso.

Nur post la Liberiĝo li finis sian vagantan vivon, sin dediĉante ekskluzive al la papertonda arto. Sub la prizorgado kaj kulturado de la popola registaro, la arto de papertondado de Ĝang atingis novan rafinitecon. Liaj verkoj estis plurfoje elmontrataj en la Giangsu-a, Orientĉinia kaj Tutlanda Ekspozicioj de Industria kaj Metiaj Artoj kaj la Internacia Papertranĉa Ekspozicio kaj ricevis favorajn rimarkigojn de la vizitantoj. La Giangsu-a kaj Jangĝou-a Popolaj Eldonejoj eldonis por li la albumojn *Papertondado de Ĝang Jongŝou* kaj *Kunfloro de Cent Floroj*, respektive. En la albumo de papertranĉado kun fremdlingvaj klarigoj estis ankaŭ elektitaj kelkaj el liaj majstraj verkoj.

Paperaj Floroj Vivoplenaj

Kompleze Ĝang montris al ni kelkajn verkojn kiujn li tranĉis dum la lastaj jaroj. Iliaj plej rimarkindaj karakterizaĵoj estas beleco, firmeco de linioj, flirtanta malpezeco kaj pleno de abunda

* Tuko laĉebla sur brusto, kiun virinoj portas rekte sur la haŭto.

vivforto. Kvankam la papertondadoj estas blankaj, tamen ili vidiĝas kvazaŭ kun sonoj kaj koloroj, donante imagon pri pompa florado de diversaj floroj kaj tumulto de flirtantaj abeloj kaj papilioj. Li plej lertas je la tondado de floroj, precipe krizantemoj. La nombro de la krizantemoj kiujn li eltondis dum la lastaj kelkaj jaroj jam kreskis de kvar-kvin ĝis pli ol ducent specoj.



La "ora tranĉita veluro", kiun oni rigardas kiel rarajn el la krizantemoj, havas tiel densajn mallarĝajn kaj pintajn petalojn ke je la unua rigardo oni vidas ke ĝi similas al lanuge malkompakta bulajo. Sed per sia unika lerteco la papertonda artisto eltondis multajn petalojn nur duonmilimetron larĝajn, kiuj disetendiĝas de la centro de la stamenoj vico post vico, densaj sed bonordaj kaj klare distingeblaj. Krome sur la pintoj de la petaloj li eltondis disbranĉaĵojn en maldikeco de haroj, kiuj vidiĝas kvazaŭ gemo radianta. Jen pompe floranta "ora tranĉita veluro" estas transplantita sur la paperon! Tiu ĉi tondado estas laŭdita de multaj homoj. Gu Bokuj, fama pentristo en Jangĝou, iam diris: "La 'ora tranĉita veluro' estas tiel lanuga ke mi eĉ ne kuraĝas pentri ĝin. Kiu atendas ke Ĝang povis eltondi ĝin tiel subtile!"

Efektive la krizantemoj sub la tondilo de Ĝang Jongŝou estas tiel mite belaj. Iuj kun dikaj branĉoj kaj larĝaj folioj aspektas pompaj kaj majestaj. Aliaj estas sveltaj



kaj ĉarmaj. La "longa perla rulkurteno" kun siaj petaloj malsupren pendantaj vidiĝas tute eksterordinara, dum la "barbo de la dio de longviveco" kun kurbaj turniĝantaj petaloj havas sian apartan belecon. Vidinte la krizantemojn de li tonditajn, spertuloj pri floroj povas tuj eldiri iliajn nomojn. Sed malgraŭ la variaj aspektoj de diversaj krizantemoj li dotis ilin per komuna nobla karaktero de rezistkapablo kontraŭ la frosta prujno. Antikva poeto Su Dongpo (1036-1101 p.K.) iam verkis verson pri krizantemo: *Al krizantemoj branĉoj prujnonspitaj ankoraŭ postrestas*. Ĝang ĝuste prezentas la spite man spiriton de la krizantemoj kontraŭ malvarmeco, vento kaj prujno.



Ĝang Jongŝou povas eltondi ne nur la animfirmecon de la krizantemoj, sed ankaŭ la kristale senmakulan purecon de prunfloroj. Interkomparante la prunflorojn kiujn li eltondis en diversaj stadioj, ni povas rimarki ke la progresado de la artisto estas mirinda. Liaj prunfloroj en la frua stadio estis figurataj kiel

simbolo de ĝojo. Ili estis plejparte desegnoj por kapkusenoj kaj rubandoj, ankoraŭ ne sin liberiginte de la formo de "ŝablonoj". Poste en tondado de prunfloroj li pli atentis pri iliaj firmeco kaj pureco. Sed la prunfloroj kiujn li eltondis lastatempe por paraleligi la poemon de Guo Moĵuo manifestas unuflanke la kontraŭfrostan elportemon similan al tiu de la krizantemoj, kaj aliflanke ĝian ĉarmon kaj mildecon. La ĉefa trunko kreskas fortika kaj firma, dum la branĉoj estas kurbaj, kun elstaraj tuberoj montrantaj ke la prunarbo jam travivis multajn severajn vintrojn. Tamen la floroj estas tiel multnombraj kiel la dense brilantaj

steloj, iuj plenflorantaj, aliaj duonflorantaj, ankoraŭ aliaj nur en burĝonoj kaj kelkaj estas simple tiaj malgrandaj punktoj kiujn oni tamen povas facile ekkoni je la unua rigardo kiel burĝonetojn. Oni opinias ke la prunfloroj kaj krizantemoj de Ĝang Jongŝou estas similaj en beleco kvankam malsimilaj en stilo. Efektive liaj prunfloroj kaj krizantemoj estas kaj similaj kaj malsimilaj, ĉar lia tondilo povas lerte desegni la karakterizaĵojn de la du specoj de floroj kiuj estas kaj similaj kaj ne tute similaj unuj al la aliaj.

Lerni de la Vivo

Oni miras, kiel Ĝang Jongŝou povas eltondi florojn kaj mal-

grandajn animalojn tiom vive kaj ĉarme per kvin kolorojn longa tondilo sen modeloj aŭ antaŭfaritaj skizoj sur la papero. Sed tiuj, kiuj bone konas lin, scias kiom persiste li penadis en tiu ĉi papertonda arto. Tra la tuta jaro li diligente sin okupas en kreado. Eĉ en severaj vintroj kiam liaj fingroj sentigiĝas pro mal-



KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

Nova Reto de Trafiko en Siĉuan-provinco

Pri la interkomunikado de Siĉuan, la ĉina granda poeto Li Baj (Li Tai Po 701 — 762 p.K.) verkis la jenan version: "Malfacilas la vojaĝo al Siĉuan kiel al la ĉielo". Dum jarcentoj, oni karakterizis per tiu ĉi priskribo la trafikon de Siĉuan. Ĝis la Liberiĝo, neniu fervojo sin trovis en la provinco, sed nun tie estas du linioj ligigantaj kun la tutlanda reto de fervojoj. En la pasinteco, nur triono de la urboj kaj urbetoj en Siĉuan interligiĝis per ŝoseoj, sed nun inter ĉiuj urboj kaj popolkomunumoj povas trafiki aŭtobusoj kaj ŝarĝaŭtoj. La navigeblaj akvojoj plimultiĝis ol antaŭ tri jaroj je 50 %, kaj la komercaĵoj transportataj ĉiujare sur Jangzi-rivero kaj ĝiaj branĉoj en la provinco kelkoble pli multas ol antaŭ la Liberiĝo.

Kuba Ĉefministro Donacis al Ĉinio Bovoranojn*

Fidel Kastro, ĉefministro de Kubo ĉijare donacis al la ĉina registaro multegon da grandaj bo-

voranoj manĝeblaj, kiuj atingis Pekinon jam en julio kaj estas disportitaj al la provincoj Guangdong kaj Giangsu, al Ŝanhajo k.a. lokoj por bredado. Transportite tra longa vojo, ili tamen bone vivas. La 15 bovoranoj prove bredataj en Guangdong jam elmetis fraĵojn, kiuj fariĝis pli ol 120,000 ranidoj forlasinte unuj post aliaj sian vosteton. Ankaŭ tiuj bredataj en Ŝanhajo bone kreskas.

Karaso el Afriko Hejmas en Ĉinio

La afrika karaso kiu povas vivi kaj generi en marakvo aŭ dolĉakvo, rapide kreskas kaj multe produktas, estas tre simple kaj facile kulturebla. La Instituto pri Akvaj Estajoj de la Ĉina Scienca Akademio jam en 1957 kondukis ilin al regiono de ĉ. 25 gradoj de la norda latitudo en Ĉinio por esti prove bredataj kaj oni trovis, ke ili bone kreskas. En 1959, oni prove bredis ilin ankaŭ ĉe la urbo Vuhan, proksime de 31 gradoj de la norda latitudo kaj eltrovis travintran rimedon sekuran, ekonomian kaj simplan por tiuj fiŝoj ne vivikonvenaj en malalta temperaturo.

Scienco Servas por Fiŝistoj

La Orienta Maro ĉe Ĝegiang-provinco estas unu el la gravaj fiŝkaptejoj de Ĉinio. Por efike disvolvi ties fiŝentreprenon, la sciencaj laborantoj de la Ĝegiang-a Marprodukta Instituto sin okupas pri antaŭsciigo de fiŝosvarmoj, ekde la jaro 1958. La fiŝistoj nomas ilian laboron kiel "Milmejl-an Okulon", ĉar la informoj donitaj en la pasintaj jaroj plejparte konformiĝis al la reala stato.

Ekspozicio de Antikvaj Moneroj

En julio okazis en Ŝanhajo la Ekspozicio de Moneroj de la Diversaj Dinastioj de Ĉinio. Ekspoziciigis en ĝi moneroj en formoj de antikva spado, tranĉilo k.a., rondaj moneroj kun ronda truo de la landoj antaŭ kiam la Komenco Imperiestro de Kin-imperio unuigis Ĉinion en la jaro 221 a.K. kaj diversaj rondaj moneroj kun kvadrata truo en la mezo de la postaj dinastioj. Inter ili sin trovis multaj valoraj specoj malofte vidataj. Ekzemple, la monero Da Pin cirkuligita de Tajping-ĉielregno, la regpotenco de la ĉina kamparana revolucio dum la

* *Rana catesbiana*

varmego, li ne malstreĉas sian klopodadon. Li estas tre serioza eĉ je unu branĉo, unu folio, unu skvamo aŭ unu ungo. Precipe li faras profundan kaj akran observadon al la vivo. Li havas tian floramon ke li ĉiam kunestas kun maljunaj ĝardenistoj, demandante ilin pri la karakterizaĵoj de diversaj floroj. Li ankaŭ ŝatas malgrandajn animalojn. Por observi la bekadon de kokoj, li ofte rigardadas dum kelkaj horoj.

En la komenco la koko kiun li eltondis estis simila al koko nur forme. Iufoje en vilaĝo li vidis interbatalon de du kokoj kun kolplumoj tute starantaj. Kiom bravaspektas ili estis! Ekde tiam li priatentis la animstaton de la



kokoj en la tondado. Ĉar li estis ne kontenta je nura prezento de la ekstera formo de kokoj, li opinias ke papertonda arto ne estas simpla fotografado, ĝi devas havi altgradan resumforton kaj kreivon. Post longtempa observado al la kokoj, li sukcesis eltondi arogantan kokon kun levita kapo, kies kolplumoj estas iom

malkompaktaj kaj la granda vostplumaro alten levita. Ĝi staras sur unu piedo kun la alia iom fleksita, aspektante eksterordinare majesta. Ĉu ĝi estas fiera pri ĵusa triumfo super sia rivalo, aŭ ĉu ĝi estas ĝoja post kiam ĝi manĝis grandan skolopendron, aŭ ĉu ĝi estas memkontenta pri sia belega plumaro? Jen tiamaniere Ĝang Jongŝou traktas sian artan verkadon, kiu ne nur estas fidela al la realeco, sed ankaŭ redonas la spiritajn trajtojn de la objekto.

Kunligiĝo de la Arto kun la Vivo

Oni ŝatas la papertondadojn de Ĝang Jongŝou, ĉar pere de banalaj objektoj li kondukas la rigardantojn en ravitecon. Aro da

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

periodo de 1851 ĝis 1864, jam estas la sola en sia speco en la nuna tempo. El ĝiaj pli malgrandaj moneroj postlasitaj restas nur 4 specoj, du el ili havis ankaŭ lokon en la ekspozicio. Tie montriĝis ankaŭ la monbileto plej frue uzita en Ĉinio kaj emisiita de Songdinastio (998 — 1022 a.K.).

Ĉinstilaj Pentraĵoj Prosperas

La ĉina tradicia pentrarto ĝuas senprecedencan prosperon dum la lastaj jaroj. En la Tutlanda Belarta Ekspozicio okazinta antaŭ nelonge, estis elmetataj 200 ĉinstilaj pentraĵoj inkluzive tiujn de famaj pentristoj kiaj Ki Bajŝi, Hju Bejhong k.a. El la 36 belartaj ekspozicioj aranĝitaj en Pekino dum 1961, pli ol 10 estis dediĉataj al ĉinstilaj pentraĵoj. Por edukigi pentristojn de la juna generacio, 3 novaj institutoj pri ĉina pentrarto fondiĝis post la Liberiĝo. Kaj cetere, la Centra Belarta Instituto kaj aliaj pligrandaj artaj kolegioj kaj lernejoj ankaŭ stariĝis fakultaton de ĉina pentrarto. 250 personoj el la membroj de la Unuiĝo de Ĉinaj Artistoj estas artistoj de ĉinstila pentrarto. La Unuiĝo ĉiujare organizas por ili vojaĝojn al diversaj lokoj en la

lando kun la celo de pentrarta verkado.

Ekspozicio de Japanaj Belskribaĵoj

La belskriba arto estas tre ŝatata en Ĉinio kaj Japanio, kaj ambaŭ landoj multe sin ligas en la evoluado de tiu arto. Por pliintensigi la interfluron de la belskriba arto de la du landoj, oni okazigis en junio k.j. en Pekino ekspozicion de japanaj belskribaĵoj. 60 verkoj de la japanaj famaj belskribistoj Hodo Ŝonkaj, Oĝi Sejran, Mazui Nioriu, Niŝikava Jasuŝi estis ekspozitaj. Troviĝis inter ili skribaĵoj en diversaj formoj, verkoj de sigelila gravurarto de la antikvaj ĉinaj ideografiaĵoj, kaj ankaŭ manskribaĵoj de artistoj de la modernaj skoloj poeziisma kaj abstraktisma.

Kolektado de Tamburmuzikaĵoj

Tamburmuziko estas grava konsistiga parto de la klasika muziko en Ĉinio. En la lastaj jardekoj, preskaŭ nenio aŭdiĝis pri ĝi. Ĉinaj muziko-laborantoj dum jaroj penetriĝis en la popolamason

por ĝia informiĝo kaj jam kolektis 30 kajerojn de tamburmuzikaj notoj inkluzive pli ol dek grandatipajn verkojn. Lastatempe oni sukcesis kolekti preskaŭ perditan pecon ĉe ses maljunaj tamburartistoj kiuj aĝas de pli ol 70 jaroj en Gihian-vilaĝo de Ĝouĝi-gubernio, Ŝenhi-provinco per sonregistrado kaj fotografado. Tiuj malkovroj estas multvaloraj por studo pri la ĉina antikva muziko.

Du Novaj Rekordoj de Biciklado-turniro

En la amika turniro de biciklado de 5 organizoj de la Popola Liberiga Armeo okazinta en junio k.j. en Pekino, la sportisto Han Guangĝi el Giangsu-provinco rompis la landan rekordon per atingado de 1 minuto kaj 14.4 sekundoj en la konkurso de milmetra kurado (kun starto en kurado); la Bicikla Teamo de la Popola Liberiga Armeo, konsistanta el la kvar personoj Kian Huajju, Haŭ Ĵudian, Ŝi Gjun kaj Sun Ŝihaj, rompis la landan rekordon de vira 4 kilometra kolektiva turniro (kun starto ĉe la ekkurejo) per atingado de 5 minutoj kaj 4.8 sekundoj.



kokidoj estas bekpikantaj manĝaĵojn inter herbaroj kiam la patrino kokino trovas vermon. Prenante la grasan molan vermon en sia beko, ŝi iomete etendas la flugilojn kaj anstataŭ manĝi ĝin vokas siajn karuletojn por ĝui la frandaĵon. La kokido, kiu troviĝas plej proksime al la patrino, la unua aŭdas la vokon. Kun sia tuta atento koncentrigita al la malgranda vermo, ĝi rapidas al la kokino. La aliaj du kokidoj kiuj troviĝas pli malproksime, aŭdinte la vokon, sin direktas al la patrino tiel rapide, ke unu kuras saltante, dum la alia serĉas la helpon de siaj flugiletoj, ilin svingante. Tiu ĉi papertondaĵo akiris admiron de sennombraj rigardantoj.

Ĉiuj ŝatas kunigi la arton kun la homa vivo. Eĉ tiuj kiuj ne bone scias aprezi arton, nek studas pri la linioj kaj komponado, kiujn la artisto uzis por sia kreaĵo, tamen havas komunan penson: "Ili estas tre interesaj." Etaj infanoj estas ĉiam amindaj kaj la granda patrino amo ĉiam

emocia. La kokino kaj kokidoj ĝuste esprimas la korstaton kiun la artisto volis komuniki. Ĉar tiaj banalaj fenomenoj estis ne preterlasitaj de la akra sentemo de la artisto, kaj Ĝang Jongŝou jam saturis tiujn ĉi verkojn per siaj sentoj, sekve liaj tondaĵoj povas forte tuŝi la koron de la rigardantoj.

La pentristoj prezentas la belecon de floroj per koloroj. Sed estas mirinde ke Ĝang uzas nur pecon da blanka papero kaj povas redoni neimageble variajn vidaĵojn. Ekzemple, la du bildoj de cikadoj sur saliko kiujn li tondis, donas tute malsamajn imagojn. En unu la vergoj de la saliko estas pendantaj malsupren kaj sur ili unu cikado komforte ripozas senmove kaj alia daŭre ĉirpas vibrigante siajn flugilojn. Tio montras ke en la sufoke varmega somera tago ne blovas eĉ venteto, sed la ĉirpado de la cikado surdigas la orelojn. En la alia tondaĵo la artisto ne multe ŝanĝis la bildon, sed nur




flirtigis la vergojn de la saliko per kelkaj simplaj tranĉoj. Tio donas al la rigardantoj la impreson ke malvarmeta vento trablovas inter la salikvergoj kaj forbalaas la preman varmegon de la somero.

Oni diras ke la bona pentraĵo havas en si poezion, je kio estas ankaŭ riĉaj la papertondaĵoj de Ĝang Jongŝou. En kelkaj el siaj verkoj li ankaŭ alprenis la esencojn de ĉinstila pentrarto. Lia



tondaĵo *Saliko kaj Hirundoj* plene manifestas la imagon de la verso: "En paroj heroldas hirundoj ke venas printempo."

Nun li okupas sin diligente pri tondaĵoj por la albumo *Cent Krizantemoj* eldonota de Giangsu-a Popola Eldonejo dediĉe al la dektria datreveno de la Nacia Tago. El la pli ol sepdek pecoj kiujn li jam fintondis, multaj estas liaj novaj verkoj tre ravaj. Ni kredas ke tiuj ĉi artaĵoj nepre elsendos speciale allogan brilon en la ĝardeno de cent floroj.



ANTIKVA ANEKDOTO

Kaŭzi Malagrablaĵon al Si Mem

JAN-ZI, kortegano de Ki-regno, venis al Ĉu-regno kiel diplomato. Kaj la reĝo de Ĉu intencis malhonori Ki-regnon en lia ĉeesto.

Iun tagon, la reĝo de Ĉu aranĝis bankedon por lin regali. Kiam ili manĝis en gaja humoro, du pedeloj kondukis ĉirkaŭligitan krimulon al la reĝo.

"Pri kio la homo krimis?" ruze demandis la reĝo.

"Li estas rabisto kaj — ki-ano," respondis unu el la pedeloj.

Tion aŭdinte, la reĝo sin turnis al Jan-zi: "Do la ki-anoj estas rabemaj."

"Via Reĝa Moŝto," Jan-zi stariĝis kaj respondis, "oni diras: 'La oranĝarbo kiu kreskas sude de Huaj-rivero ŝanĝas sian naturon, post kiam ĝi estas transplantita sur la nordan bordon de la rivero.' La folioj restas samaj en aspekto, sed la fruktoj gustas tute malsame. La popolanoj de Ki-regno neniam rabas en sia lando, se iu fariĝis rabisto post kiam li venis al Ĉu-regno, laŭ mia opinio, tion kaŭzis la cirkonstancoj de Ĉu-regno."

La reĝo de Ĉu mutiĝis.

Pekina Loĝanto antaŭ Kvindek Mil Jaroj

SUR la Drakosta Monto ĉe Ĝou-koŭdian, sud-okcidente de Pekino, krom la fosilio de la ĉina simio-homo (*Sinanthropus Pekinensis*) antaŭ kvincent mil jaroj, oni eltrovis ankaŭ en la jaroj 1933-4 fosiliojn de la montsupra kaverno — la pekina loĝanto antaŭ kvindek mil jaroj.

La evoluado de la ĉina simio-homo ĝis la montsupra kaverno trapasis pli ol kvarcent mil jarojn. Dum tiu tre tre longa tempo, dank' al laborado la homaro senĉese transformis kaj la naturon kaj sin mem. La korpo de la montsupra kaverno ĝenerale jam similas al tiu de la modernaj homoj, kaj rimarkinde altiĝis ankaŭ la socia produktopovo.

Unu Kudrilo el Osto

Kvankam la homo de tiu tempo uzis ankoraŭ ŝtonajn objektojn, tamen la tekniko por fari ilin jam sin montras multe pli progresinta. Kaj iliaj ŝtonaĵoj estas ne nur pli lerte faritaj, sed ankaŭ de diversaj specoj kaj formoj. Pli grave estas, ke ili jam scipovis fari laborilojn el ostoj kaj korno de bestoj. La novaj produktaĵoj sin prezentas kaj pli malpeza kaj pli akra, kompare kun la ŝtonaj objektoj, kaj sekve pli utilaj. En la montsupra kaverno oni malkovris kudrilon el ostoj, uzitan de la tiama prahomo. Ĝi estas longa je du kaj duona coloj, ĝia pinto tre akra kaj la trueto estas borita per ŝtona ilo. Por kio ĉi tiu osta kudrilo estis uzata? Plej kredeble por kudri vestaĵojn. Do ili ne plu restis tute nudaj.

Jam Lerta en Fiŝado kaj Ĉasado

En tiu tempo oni jam scipovis fari lancopinton el bestaj ostoj,



La vivo de la "montsupraj kavernoj" laŭ imago.

Ilustrita de Vu Vej

korno aŭ ŝtonpeco, kaj, ĝin ligi sur ligna bastono kaj tiel formi longan lancon. Ĉasi per tia ilo signifas, ke oni longigis sian manon pluroble. Kaj ili ankaŭ faris fiŝforkegon el bestostoj por fiŝkaptado. Antaŭe ili povis kapti fiŝojn nur per la manoj, aŭ kolekti el ŝlimo kelkajn por manĝi, dum la rivero aŭ lago estas senakva; sed nun, ili povis manĝi multe pli da bongustaj fiŝoj.

En la montsupra kaverno la arkeologoj malkovris ornamaĵojn el ostoj de haringo, dentoj de tigro, vulpo, hundo, melo ktp. La haringoj estis grandaj, la tigro estas kruela besto, kaj la vulpo tre ruza; kaj tamen, la montsupra kaverno jam kreis pli bonfikaĵajn laborilojn kaj havis sufiĉe progresintan arton de fiŝado kaj ĉasado, per kiuj ili povis sukcese kapti tiujn malfacile akireblajn animalojn, kaj tiel pli vastigis la fontojn de la homaj manĝaĵoj.

Ankaŭ Kolĉeno

La eltrovitaj ornamaĵoj estas forta atesto pri la altiĝo de produktopovo de la montsupra kaverno. Se li apenaŭ povus satmanĝi per laborado dum la tuta tago, tiukaze li neniel povus havi liberan tempon kaj intereson por sin ornamati. Arkeologoj trovis proksime de la kranio de unu virino, kelke da ŝtonbidoj, ĉiu el kiuj havas boritan trueton, kaj krome ovalajn ŝtonetojn, bestodentojn, fiŝostojn kaj konkŝelojn kun etaj truetoj, kies ĉirkaŭaĵoj estas ruĝe kolorigitaj per hematita pulvoru. Ĝi estas kolĉeno pratempa, kiu formiĝas el serio da diversaj supra menciitaj, kaj kiu estis surportata ĉirkaŭ la kolo de tiamaĵ homoj.

La montsupra kaverno sciis ne nur sin beligi, sed ankaŭ enterigi la kadavron de mortinto en kaverton. Li ŝutis apud la mortinto ruĝan pulvoron de hematito, probable pro tio, ke li intencis per ĝi gardi la kadavron de sia parenco kontraŭ ŝtelmanĝo de sovaĝaj bestoj aŭ eble, por simboli sangon, kaj per tio revivigi la mortinton.

La portado de vesto kaj ornamaĵoj kaj entombigo de mortinto montras, ke jam multe disvolviĝis la produktopovo kaj saĝo de la montsupra kaverno, ke ili jam havis kompare altnivelan kulturon.

La animalaj fosilioj kaj kulturaj restaĵoj de montsupraj kavernoj nun estas ekspozitaj en la muzeo de la Drakosta Monto. Sed la ostaj fosilioj de la montsupra kaverno same kiel tiuj de la ĉina simio-homo, ĉiuj malaperis en la manoj de la usonaj imperiistoj. Ni nepre ilin reakiros.

La Maŭzoleo de Hiang-fej

— Karakteriza Konstruaĵo de Islama Arkitekturo de Ĉinio —



La Maŭzoleo de Hiang-fej.

FORLASINTE Kaŝi, urbo en la plej fora parto de nordokcidenta Ĉinio, ni veturis orienten kaj baldaŭ vidis grandan konstruaĵon kun karakterizaĵoj de la ujugura arkitekturo. Ĝi estas la fame konata Maŭzoleo de Hiang-fej.

Sur la vojo iu maljuna sinjoro, kiu studas islaman arkitekturon, rakontis al ni la devenon de tiu ĉi tombo kaj la legendojn pri ŝi. Origine Hiang-fej estis edzino de iu ujugura tribestro. Kiam la kvara imperiestro Kianlong (regis 1736-1795 p. K.) de King-dinastio konkeris la ujugurojn, li forrabis ŝin en la palacon kaj havis por ŝi tre grandan favoron. Sed Hiang-fej ĉiam konservis en si venĝemon kaj sekrete kunportis pordon. Poste la patrino de la imperiestro tion eltrovis kaj ŝin strangoligis. Iuj diris ke la nuna Maŭzoleo de Hiang-fej estis propre la tombkonstruaĵo de ŝia avo. Aliaj asertis ke ĝi estis tiu de ŝia praavo. Post ŝia morto, laŭdire la imperiestro de King-dinastio sendis ŝian kadavron al ŝia naskiĝloko kaj enterigis ŝin en ĝi. Tiel, ĝi konatiĝis kiel la Maŭzoleo de Hiang-fej. En la konstruaĵo ankoraŭ postrestas hodiaŭ malnova palankeno, kiu, laŭdire, estis la originala objekto per kiu estis transportita la kadavro de Hiang-fej.


Poste, laŭ la ordono de la imperiestro de King-dinastio oni pligrandigis kaj plibeligis tiun ĉi tombkonstruaĵon, tiel ke ĝi fariĝis sufiĉe granda konstruaĵo kun propraj karakterizaĵoj de la islama arkitekturo.

Dum nia restado en Kaŝi ĝuste okazis la solena islama Kurban-festo. Dum la festotagoj, en kaj ekster la bela maŭzoleo svarmis islamanoj el diversaj lokoj foraj kaj proksimaj kaj tie regis vere festa atmosfero. Post plenumo de la preĝado, la vizitantoj sin amuzis per diversaj artaj programeroj por plene ĝui tiun ĝojindan okazon.

La arkitekturo de la Maŭzoleo de Hiang-fej alprenis la metodon de elstarigo de la ĉefaj punktoj. La portalo, lunrigardaj turoj, tegmentaj vizieroj, sokloj kaj kupoloj ĉiuj estas tegitaj orname per koloraj glazuritaj kaheloj. Speciale garnituritaj estas la ĉefaj eksteraj partoj de la konstruaĵo per gipsaj ornamaĵoj.

La uzo de gipso kiel materialo por arkitektura garnituro jam havis longan historion en Kaŝi. Por

Gipsaj ornamaĵoj sur la lunrigarda turo.




la gipsaj garnituroj de la Maŭzoleo de Hiang-fej oni aplikis la pasintan sperton kaj ĝin plue disvolvis. Ekzemple, sur la muroj ambaŭflanke de la portalo estas uzitaj delikataj gipsaj garnituroj sur vasta spaco. Sur la muroj ĉe la enirejo kaj sur la lunrigardaj turoj la gipsaj ornamadoj estas kontrastitaj per bela helkolora fono kiu des pli reliefigas la gipsajn floradojn. Sur la lunrigardaj turoj estas uzitaj ankaŭ gipsaj filigranoj, kiuj donas bonajn dekoraciajn efektojn per la ombro kaŭzita de la lumo. La gipsaj garnituroj estas forme ankaŭ multvariaj kaj malsamaj formoj estas aplikitaj en malsamaj pozicioj. Ekzemple, ĉe la supra parto de la lunrigardaj turoj kies pozicio estas kompare alta, estas ĉefe aplikitaj filigranaj gipsaj garnituroj el fortikaj geometriaj figuroj. Sur la muroj ĉe la enirejo estas aplikitaj bareliefigitaj gipsaj garnituroj en formo de delikataj kaj densaj volvtigaj vegetaĵoj.

Sur la lunrigardaj turoj kaj muroj de la preĝejoj — akcesoraj konstruaĵoj de la Maŭzoleo — speciale faritaj brikoj estas uzitaj por kunmetite formi desegnojn riĉajn je dekoraciaj efektoj. Tio estas tre malofta en aliaj regionoj de Ĉinio.

Ankaŭ en la aranĝado de koloroj de la ekstero de la konstruaĵo, estas aplikita la principo elstarigi la gravajn punktojn. La lunrigardaj turoj sur la kvar anguloj de la Maŭzoleo kaj la sokloj, tegmentaj vizi-eroj kaj kupoloj havas ĉefe bluverdajn aŭ herboverdajn glazuritajn kaheltegaĵojn, tiel ke la stabila sento de la konstruaĵo estas fortigita kaj la konturoj de la konstruaĵo reliefigitaj. La malhelkolora glazura tego faras klaran kontraston kun la flava koloro de la muroj, tiel ke la tuta konstruaĵo aspektas brile impona.

Ĉirkaŭ la ĉefa konstruaĵo de la Maŭzoleo estas ankoraŭ tri nacistilaj kapeloj en malsamaj grandecoj,



Ornamadoj interne de la kapelo en la Maŭzoleo de Hiang-fej.

instruejo de la sankta skribo, banejo kaj kuirejo por la uzado de la popolamasoj dum la tempo por pilgrimado kaj preĝado, loĝejo de imamo, lageto, placo k.a., kovrante kune pli ol 2,000 kvadratajn metrojn. La loko estas altsitua, kvietaj kaj bela, kun densaj altaj arboj kaj fruktarbaroj apude. La rekte starantaj popoloj karakterizaj por tiu regiono plantitaj ĉirkaŭ la konstruaĵo ne nur beligas la cirkonstancon, sed ankaŭ kontrastas kun la flavaj konstruaĵoj de la Maŭzoleo per sia densa verda foliaro, efike reliefigante kaj dekoraciante ilin.

Tia arkitektura aranĝo estas ofte renkontebla ankaŭ ĉe la antikvaj konstruaĵoj en Kaŝi kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Oni povas diri ke la aranĝado de la dekoracio kaj verdigo de la Maŭzoleo de Hiang-fej koncentrigis en certa grado la tiaman popolan tradicion sperton de arkitekturo en Kaŝi. Sekve ĝi havas tre fortan lokan karakterizon.

Ĉe la supro de tiu ĉi konstruaĵo troviĝis antaŭe ora pinto kaj en la kupolo estis almetita ora honortabulo donacita de la imperiestro de King-dinastio. Sed ili estis forrabitaj de la lokaj reaciaj regantoj antaŭ la Liberiĝo. Ĉe la Liberiĝo de Ĉinio en 1949, la fama konstruaĵo jam grave kadukiĝis, kaj la kupolo jam disfalis. Hodiaŭ ĝi estas riparita per la granda sumo kiun la Popola Registaro tiucele asignis. Nun la konstruaĵo kun historio de pli ol 150 jaroj denove brilas pompe.

Matematiko

Inspirita de Tableto

— Historieto pri laborista-matematikista invento de nova kalkul-metodo —


Depost 1947 la matematikisto Ju Ĝenŝan, kiu antaŭe estis vilaĝa lignaĵisto, jam estas bone konata de la laboristoj kaj la kamparanoj en la Liberigitaj Regionoj pro sia invento de “mezurila kalkul-metodo”. Post la Liberiĝo, li studis sinsekve en la Tiangin-a Universitato kaj Nankaj-universitato. Malgraŭ sia aĝo de 40 jaroj, li pene lernis, kaj ricevis kun bonega rezultato la diplomon de la matematika fakultato de Nankaj-universitato. En 1961 li estis invitita al la Hebej-a Universitato por instruado. Dum la lastaj jaroj li daŭre sin dediĉis al serĉado de simplaj kalkulmetodoj. Lastatempe li sukcesis eltrovi simplan kalkulmetodon per renovigita abako. La novaĵo estis publikigita en ĵurnalo, kaj interesis multajn legantojn de diversaj lokoj. Tial la redakcio de la ĵurnalo DA GONG BAO de Tiangin invitis k-don Ju Ĝenŝan fari paroladon por klarigi la novan kalkulmetodon. Jen estas raporto pri lia klarigo.

— La Red.


“MATEMATIKO INSPIRITA DE TABLETO”

estis la vortoj, kiujn k-do Ju Ĝenŝan skribis sur la nigratabulo komencante sian paroladon. Por klarigi la renovigitan abakon, li devis komenci de la antaŭaj formoj de tiu kalkulmetodo. Li elprenis kvadratan lignan tabulon, kaj metinte sur ĝiaj kvar


Bildo 1



Bildo 2



Bildo 3




anguloj po unu lignan kubeton, komencis sian klarigon.

“Rigardu,” levinte la tabulon ĝis la alto de siaj okuloj li diris: “de tiu ĉi flanko oni vidas ke la kubetoj estas vicigitaj 1 apud 1 t. e. 11.” (bildo 1) Tuj poste li turnis la tabulon, ke la apuda flanko montriĝu al la aŭskultantaro kaj diris: “De tiu ĉi flanko, oni vidas la saman nombron 11.” (bildo 2) Nun li metis la pleteton sur la tablon, kaj per du ferstangetoj oblikve apartigis la kvar kubetojn (bildo 3). Tiam oni povis legi laŭ la kolonoj la nombrojn 121.


Kia estas la rilato inter “121” kaj du “11”? K-do Ju Ĝenŝan skribis sur la nigratabulon: $11 \times 11 = 121$. Tio estas la “kubeta-kalkulado”.

“Vere mirinde!” ekvigliĝis kaj mallaŭte ekkriis la aŭskultantoj.

Bildo 4



Bildo 5




K-do Ju Ĝenŝan diris kun rideto al la ĉeestantoj ke tiu ĉi kalkulmetodo estas elpensita dank' al kvar piedoj de tableto. Sekve en kelkaj minutoj li klarigis kiel oni apliku tiun ĉi kalkulmetodon por multipliko de grandaj nombroj.

"Vi provu!" Tuj post sia klarigo li donis al iu aŭskultanto aritmetikan problemon " $211 \times 311 = ?$ ". Tiu ĉi kamarado plezure akceptis la neatenditan ekzamenon. Li dividis per bambustangetoj horizontale la kubetojn en tri kolonojn enhavantajn laŭorde 2,1,1 vicojn (reprezentante 211), kaj vertikale same en tri kolonojn sed enhavantajn laŭorde 3,1,1, vicojn (reprezentante 311, bildo 4). Poste li prenis la bambustangetojn kaj oblikve apartigis la kubetojn en kvin grupojn (bildo 5), jen tuj aperis la ĝusta respondo: 65621. K-do Ju Ĝenŝan diris ridante: "Nu vi ĝin ellernis."

Poste, k-do Ju Ĝenŝan montris al la ĉeestantoj kalkulaparaton kun longeco, larĝeco kaj alteco de malpli ol 17cm, faritan laŭ la sama principo. Prenante ankoraŭ

Bildo 6




la problemon de 211×311 kiel ekzemplon, ĉe la horizontalaj pozicioj de centoj, dekoj kaj unuoj li laŭvice eltiris respektive du, unu kaj unu tirstangetojn, kaj ĉe la vertikalaj pozicioj li tiris tri, unu kaj unu. Tuj sekve, el la malsupra parto de la kalkulaparato li eltiris tirkesteton, en kiu de maldekstre ĝis dekstre orde kuŝis en 5 vicoj ses, kvin, ses, du kaj unu globetoj (bildo 6). En nur tri sekundoj, la rezultato estis akirita. K-do Ju Ĝenŝan diris ke oni iam demandis: Ĉu en la

aparato troviĝas cirkvito, pilo aŭ dentradoj? Li respondis, ke ne. Antaŭ la publiko li tuj malmuntis ĝin. Montriĝis ke ĝi tute estis el ligno, kaj nur sur iuj el ties partoj sulkoj estis faritaj.

Kvankam tiu ĉi kalkulmetodo estas simpla kaj facile ellernebla, kaj eĉ analfabetoj povas ĝin mastri, tamen k-do Ju trovis ke ĝia apliko estas ankoraŭ limigita de la necesa posedo de la kalkulaparato. Aplikante la saman


Bildo 7



principon li poste komencis kalkuli sur kradoj kun kvadrato dividitaj spacoj, pli poste per liniado, oni nombras kruciĝajn punktojn de linioj anstataŭ la kubetojn. El tio ĉi kreiĝis "kalkulado per liniado".

Ni prenu ankoraŭ la ekzemplon 211×311 (bildo 7). Ĉi tie la linioj horizontalaj grupiĝas laŭ 2,1,1 unuj super la aliaj; kaj la vertikalaj laŭ 3,1,1 unuj apud la

Bildo 8



aliaj; jen la sumoj de la kruciĝpunktoj laŭvice troviĝantaj en apartaj spacoj inter oblikvaj paraleloj estas: 6,5,6,2,1, kaj la kune formita nombro estas la produkto. En duonhoro k-do Ju Ĝenŝan klarigis kiel apliki tiun ĉi kalkulmetodon en multipliko, divido, kvadrato kaj elradikado.

La komuna karakterajo de la menciitaj kalkulmetodoj estas: per adicio kaj subtraho anstataŭi multiplikon kaj dividon. Tial k-do Ju Ĝenŝan plue kombinis tiun ĉi metodon kun la ĉina abako, per kiu oni povas kalkuli rapidege en adicio kaj subtraho. Tiel kreiĝis lastatempe lia "renovigita abako".

K-do Ju Ĝenŝan montris al la publiko la novan kalkulilon (bildo 8). Ĝis malsupra parto estas ĉina abako, kaj la supra estas simpla ligna pleto, kiu estas dividita per linioj en kolonojn konforme al la diversaj buletkolonoj de la abako ĉe malsupro. Anstataŭ liniado nun estas uzataj maldikaj bambustangetoj aŭ ferstangetoj. Per la aparato oni kalkulas same kiel ĉe "kalkulado per liniado", nur la direkto de la ŝtalstangetoj estas ŝanĝita en oblikvon kiel la bildo montras. Almetinte la ferstangetojn, kiuj reprezentas la ciferojn oni nur manipulu la abakon por adicii la sumojn de la kruciĝpunktoj de diversaj grupoj en la respektivaj kolonoj, kaj la rezulto jam estas preta sur la abako.

Post kiam k-do Ju Ĝenŝan finis sian paroladon, multaj aŭskultintoj prezentis al li diversajn demandojn pri praktiko kaj lernado de la nova kalkulmetodo al kiuj li donis kontentigajn respondojn unu post alia, kaj samtempe li informis al ili, ke pri la menciitaj kalkulmetodoj aperos broŝuroj, por faciligi ĝian lernadon al laboristoj kaj kamparanoj. Krome, la Centra Produktejo de Dokumentaj Filmoj jam faris mallongan filmon *Laborista Matematikisto* pri la atingoj de liaj laboroj. Do oni jam povas vidi sur ekrano la tutan historion de lia inventado.

KIAM LA PATRO etendis la paperon kaj prenis la plumon por verki, ekmalfermiĝis delikate la pordo de la ĉambro. Sidante en sia loko, la patro ne povis vidi la pordon, sed laŭ la paŝoj li sciis, ke la enveninto estas lia filo.

La patro ĵetis rigardon al la "akcipitro"-horloĝo, kiu sidis sur la malgranda ŝranko staranta kontraŭ la skribotablo. Estis la dekunua horo kaj dekdu aŭ dektri minutoj. "Kial la horloĝo denove malfruas?" demandis en si la patro kaj demetis la plumon.

"Paĉjo, posttagmeze mi iros al la Komerca Ĉambro de la urbo."

"Oh!" La patro ekmovis la buŝon, sed en sia koro li pensis pri la enhavo de la artikolo, kiun li estis skribanta, kaj cerbumis por la poluro de iu punkto. La filo, vidante ke la patro silentas, sin returnis kaj estis preta eliri.

"Al la Komerca Ĉambro? Eh?" la penso de la patro nun revenis al la filo. Li subite rememoris la vortojn de sia edzino, kiu diris al li hieraŭ, ke lasttempe Ahjang ofte eliris kun siaj samlernejanoj, foje eĉ ĝis Venmiaŭ-parko, malproksima je tutaj dek kilometroj por la iro kaj reiro, kaj ke por Ahjang, en tia junaĝo, tiom longa piedirado damaĝos la sanon.

"Por kio al la Komerca Ĉambro?" demandis la patro, sin turninte por rigardi la filon.

"Por kunveno," tiu ĉi respondis, kaj aperis sur lia vizaĝo neretenebla rideto.

Oh!—La patro ekmemoris kaj komprenis—hodiaŭ estas la 30-a de majo.

"Ĉu ankaŭ por vi alvenis la tempo iri partopreni ian 'movadon'?" diris la patro en si, fiksante sian rigardon sur la vizaĝo de la filo.

"Ni iros kune tri, de la sama klaso," aldonis la filo. Ĉiam silentema pri siaj "propraj aferoj", li ne estus volonte dirinta tiujn vortojn, se al li ne ŝajnus, ke la patro ne tre volas lasi lin iri.

"Ĉu vi konas la vojon?"

"Jes. La kunirontoj ĝin konas."

"Do, iru kaj revenu per aŭtobuso, ne plu piede. Mi donos al vi monon por la veturado." Dirinte la patro redirektis siajn okulojn al la ne-finita artikolo, intencante fermi la paragrafon per kelkaj pliaj frazoj, antaŭ ol iri malsupren por tagmanĝi.

Sed, skribante, li klare aŭdis, ke la filo serĉas librojn sur la bretaro ekster la ĉambro kaj poste malsupreniras de la etaĝo.

La paragrafo estis finita. La patro tralegis ĝin, ekskuis la kapon kaj demetis la plumon.

Li ekmemoris, ke li devas doni al sia filo monon por la veturado. Li elprenis du monbiletojn dek-cendajn kaj iris malsupren.

La filo sidis en malgranda kanseĝo kaj ruze ridetis. Li kutimis mieni tiamaniere, kiam li opiniis, ke la gepatroj zorgas kaj babilas tromulte.

La patrino estis gladanta vestaĵojn. Vidante, ke alvenas ŝia edzo, ŝi diris:

"Ahjang volas iri al la Komerca Ĉambro por partopreni en mitingo. Ĉu vi lin permesis? Li diris unue al vi, ĉar li sciis, ke vi ne malkonsentos. Mi ne volas ke li iru. Estos danĝere. Sed li diris, ke li ricevis jam permeson de paĉjo."

"Eble ne estos danĝero," respondis la patro, kaj samtempe paŝis al la filo, fikse rigardis lin, pensante: "Oh, ĉu ankaŭ por vi alvenis la tempo iri partopreni ian 'movadon'? Ĉu vi volas iri nur pro intereso, aŭ...?"

Sed la patrino faris demandon al la filo:

"Se vi estus arestita, kion vi dirus?"

"Mi dirus, ke mi estas spektatoro," respondis la filo, kaj denove ridis ruze.

"Aha! Rigardu," la patrino rapidis diri al la patro, "ili eĉ anticipu unuigis la 'konfesajon'. Organizitaj, organizitaj, ili estas pretaj por malpaco."

Antaŭ ol respondis la patro, la filo aldonis:

"Oni diris, ke ni ne kunportu multan monon, nek paperon, nek kraĵonon."



Bredejo de cervoj.

Papertranĉaĵo de Ĝoŭ Hiande

al Mitingo

“Estas do la lernejo kiu ordonis vin iri?”

“Ne.”

“Oh! Kiu do ordonis? Kiel vi sciigis, ke hodiaŭ okazos mitingo en la Komerca Ĉambro?”

“La lernejo ne oficiale ordonis,” klarigis la patrino, “sed kuraĝigis ilin iri. Partopreno en la mitingo ne estos kalkulata kiel senpermesa foresto el lecionoj. Iros eĉ iuj el la instruistoj.”

“La instruistoj iros aparte, ne kun ni.”

“Oh!” La patro jetis rigardon al la patrino; li konvinkigis, ke ŝiaj ĵus diritaj vortoj “Ili estas pretaj al malpaco” ne estas skrupulo superflua. Kaj ĉu oni povas ne esti pretaj por malpaco? Tio ja estas afero en Ĉinio!

La patrino jam fingladis la vestaĵojn. Aranĝante por formeti la elektran gladilon, ŝi diris: “Laŭ mia opinio, pli bone li ne iru. Ii estas tro juna!”

“Preparu tuj la pecetigitan omleton kun rizo. Mi devos kuniĝi kun ili je la dekdua horo!” urĝis denove la filo.

“Ĉu ankoraŭ ne batis la dekdua?” demandis la patro, kiu nur sciis, ke la antaŭtagmezaj lecionoj de la lernejo de la filo ĉiam finiĝas je la dekdua.

“Hodiaŭ li eliris el la lernejo unu horon pli frue, kaj ankaŭ tio ne estas kalkulata kiel senpermesa foresto el leciono.” Post la respondo, la patrino sin direktis al la kuirejo.

La patro denove najlis sian rigardon sur la vizaĝo de la filo kaj pensis pri la hodiaŭa tago antaŭ dek unu jaroj, kiam la filo estis nur du-jara kaj ĵus ellerninta iri sur siaj piedoj. Antaŭ dek unu jaroj, la sekvintan tagon post la sangverŝado sur Nankinstrato, kiam nokte la patrino kun du amikinoj hejmenvenis de la granda manifestacio de la popolamaso, kiu “sieĝis la Ĝeneralan Komercon Ĉambro” kaj devigis ĝin tuj “deklari la ĉesigon de la tuturba komercado”, ŝi ekprenis tiun ĉi dujaran infanon en siajn brakojn kaj rakontis ekscitita: “En nia grupo estis malgrandaj lernejoj. Kiam la rajdantaj policanoj rompis la vicojn de la antaŭe marŝantaj plenaĝuloj, pluraj lernejoj falis teren. Mi vidis, ke unu, ne pli ol dekdu- aŭ dektri-jara, ruliĝis inter ĉevalhufoj. Feliĉe tuj venis membro de la komunika grupo kaj lin forsavis. Tiam mi ekpensis pri nia Ahjang. Sed, ĉu la mondo devos resti, kiam Ahjang elkreskos granda, ankoraŭ tia, kia ĝi estas nun?”

Poste, ĉiufoje kiam okazis manifestacio, kiam la patrino vidis, ke la manifestaciantaj lernejoj suferas sub ledaj vipoj kaj ĉevalhufoj, ŝi, reveninte hejmen, ĉirkaŭbrakis sian Ahjang kaj ripetis kun koro premata la samajn vortojn.

Antaŭ ne longe, kiam ŝi vidis foton de vunditaj lernejoj, kiuj partoprenis la manifestacion en Pekino je la 16-a de decembro, ŝi diris al Ahjang, vokante lian nomon: “Ahjang! Rigardu, tiu ĉi kun bandaĝita brako aspektas nur malmultajn jarojn pli aĝa ol vi! Ho, eĉ knabojn oni persekutas!”

Tamen nun, ankaŭ alvenis por Ahjang la tempo partopreni ian “movadon”! Kredeble multaj knaboj, kiuj estis samaĝaj kiel Ahjang antaŭ dek unu jaroj, nun ankaŭ sin preparas kiel li, kun scivolemo kaj entuziasmo, por la partopreno en la unua manifestacio.

Pensante en si, la patro sentis ioman ĉagrenon, sed samtempe ioman konsoliĝon.

La filo estis rapideme manĝanta la pecetigitan omleton kun rizo. La gepatroj sidis flanke kaj lin rigardis. La patro pensis, ke estas necese ion diri al li, sed la vortoj direndaj estas ja multegaj kaj verŝajne ne tute kompreneblaj por li, kiu ankoraŭ estas tro juna.

La patrino tamen alparolis lin la unua:

“Se post la mitingo sekvos manifestacio, ĝin ne partoprenu, Ahjang.”

La filo nur zorgis pri la enbuŝigo de la manĝaĵoj.

“La manifestacion vi povos ne partopreni. Vi ĵus resaniĝis de ftizo; multa piedirado damaĝus vian sanon. Krome, se viaj vicoj estos disrompigitaj dum la marŝado? Kiamaniere vi hejmenvenos, ne konante la vojon?” konsilis ankaŭ la patro.

Sed la filo ruze ekridis kaj, rapide fininte la manĝon, respondis kvazaŭ plende:

“Ne maltrankviliĝu, ne timu! Se mi ne konos la vojon, mi pridemandos, mi prenos rikŝon!”

Li etendis la manon kaj demandis: “Kaj la mono por la veturado?”

La patro donis al li du monbiletojn dekcendajn, kaj li iris for. La patrino staradis ĉe la malantaŭa



pordo akompanante lin per rigardo ĝis li eliris la strateton.

“Vi ne devis anticipi doni al li la permeson!” la patrino plendis kontraŭ la patro, kiam ŝi revenis al la salono.

“Ne doni al li permeson? Do li iros estonte sen via sciigo!”

“Sed li ja estas tro juna!” diris la patrino suspirante.

La patro ekskuis la kapon kaj bruligis cigaredon. Lia penso ree turniĝis al la artikolo, kiun li devis pretigi tiuvespere.

La gepatroj, sidante unu kontraŭ la alia, kune tagmanĝis, kaj sentis sin iom solecaj.

“Mi intencis iri kun li. Se okazos manifestacio, mi venigos lin hejmen. Sed poste mi pensis, ke tiam mi renkontos neeviteble multajn konatojn, kaj ke krome li certe ne volos hejmon veni kun mi. . .” La patrino diris al si.

“Estas nature,” diris la patro, laŭte ridante, “ke li sekvos la popolamason, sed ne la patrino!”

“Li nenion komprenas. Li havas nur fervoron, kaj estas aŭdaca. . . Vi devas instrui al li.”

“Kiel instrui? Kaj kion instrui? Ĉu diri al li, ke li evitu sensignifan viktimiĝon? Li estas tro juna por tion kompreni.”

Parolante, la patro denove ridis laŭte, sed sur lia vizaĝo la muskoloj estis streĉitaj.

Poste, ĝis la fino de la manĝado, ili ne plu menciis tiun aferon.

Kiam la patro, fumante cigaredon, promenpaŝadis en la ĉambro, li haltis plurajn fojojn kaj ĵetis rigardon al la patrino. Liaj vangoj ruĝiĝis de ekscitiĝo. Fine, li staris fronte al sia edzino kaj diris:

“Verŝajne nur kiam la filo de Ahjang lernos en elementa lernejo, la popolamasaj mitingoj k.s. ĉesos esti minacataj de danĝero. La ĉina revolucio estas batalado longdaŭra kaj malfacila!”

“Nia Ahjang certe estos brava. Se li havas nun dudek jarojn, neniom mi maltrankviliĝus. Sed li estas nur dektri-jara. Se li tuj atingus la aĝon de dudek jaroj!”

“Estu trankvila. Kelkiam la tagoj pasas tre rapide.”

Ridis ambaŭ la patro kaj patrino. Ili ekrigardis unu al la alia, kaj ambaŭ sentis siajn okulojn malseketaj, sed ili ridis nature, ĝojanime.

Rapide forpasis la tuta posttagmezo. Sed post la sesa horo, la Tempo-maljunulo fariĝis tre stranghumora: iumomente ŝajnis ke li iras tro malrapide, dum alimomente tro rapide. La patrino estis jam

DONACO AKIRINDA!

Bela kalendaro al EPC^ĉ-abonantoj de 1963

12 koloraj ĉinstilaj pentraĵoj de famaj pentristoj kun kalendaraj tabeloj de la 12 monatoj. La papero, altkvalita. Formato, 13cm. × 18cm.

La preskvanto, limigita. Nur tiuj kiuj ensendos sian abonon antaŭ la 31-a de januaro, 1963 (laŭ la enpostiga dato) ricevos ĝin kun certeco. Tuj abonu ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Administracio.

**La Administracio de
ĈINA ESPERANTO-LIGO**

riprensanta, kien ŝi devos iri por informiĝi kaj al kiuj pridemandi.

Kiam pasis la oka, komencis maltrankviliĝi ankaŭ la patro. Nun venis amiko, kiu kunportis diversajn flugfoliojn kolektitajn en la mitingo de tiu tago. Sciĝinte de li, ke okazis nenio malbona en la tago, la patrino eksentis sian koron iom malsarĝita.

Tamen ŝin maltrankviligis alia zorgo: “Eble li estus perdinta la vojon? Aŭ li estus kolizie faligita de aŭto?” Al la patrino la infano ĉiam ŝajnas ŝafido ĵus naskita.

Nur ĉirkaŭ kvaronon post la naŭa la filo revenis. Enpaŝinte la ĉambron, li tuj rimarkis la flugfoliojn de la mitingo sur la tablo.

“De kie ili estas?” li kriis.

Li tuj elpoŝigis la ekzempleron kiun li mem alportis.

Ambaŭ la patro kaj patrino eksplodis per rido.

La patrino kaptis la filon kaj demandis:

“Kiel iris la manifestacio? Rakontu al panjo!”

“Ni marŝis al la tombejo de la martiroj de la ‘30-a de Majo’, poste al la Norda Stacidomo, kie nin baris soldatoj kaj ni disiris. La plandoj tute ne doloras.”

Respondante, la filo elpoŝigis alian papereton, sur kiu estis presitaj ruĝaj vortoj, kaj aldonis:

“Jen estas la sloganoj. Kiel ĝoje ni kriis!”

(Ŝanhajo, junio de 1936)

Esperantigis Yang Yongsen

Tranĉilakrigisto

IUN TAGON, kiam mi ordigis objektojn, mia edzino venis el la kuirejo grumblante: “Vidu, la tranĉil-rando ree breĉetiĝis!” Mi transprenis la tranĉilon kaj trovis ĝian randon breĉetita kvazaŭ segilo. Mi povis fari nenion alian ol frotakrigi ĝin sur la ŝtona rando de baseno kaj diris malpacience: “Estonte, ne uzu ĝin ofte por haki ostojn kaj similajn!”

“Prave! Sed per tranĉilo fabrikita de Forĝisto Lu oni povas haki eĉ brullignon!”

Tiu Forĝisto Lu estis fameta en tiu ĉi urbeto en la pasinteco. Fakte, lia familia nomo ne estas Lu, sed Vang. Lia familia sin okupis pri la forĝista metio jam por kvin generacioj ĝis li. Ekde lia avo, la familia komencis famiĝi, kaj la metiarto transdonita de generacio al generacio ĉiam pliboniĝis, kaj perfektiĝis pli ĉe li. La tranĉiloj de li fabrikitaj estas fortikaj, akraj, longuzaj, malpezaj, belformaj kaj malmulte kostaj. Ne nur ĉiuj loĝantoj en nia urbeto uzis liajn tranĉilojn, sed ankaŭ tiuj en la radio de kelkcent lioj uzis la tranĉilojn de lia Limin-ferajejo. Laŭdire, la nomo de Limin-ferajejo estis konata eĉ de iuj en aliaj provincoj.

Li ne nur famiĝis pro la tranĉiloj, li ankaŭ bone scipovis ripari pelvon, kaldronon, kulregon, tondilon, ktp. Inter siaj kolegoj li estis nomata la Lu Ban* de forĝistoj, kaj tiel la nomo de Forĝisto Lu disvastiĝis.

* Lu Ban estis la plej lerta ĉarpentisto en antikva Ĉinio.

Kontraŭ Limin-ferajejo estis Vanli-ferajejo, kies posedanto, Ĝoŭ Vanli, estis homo insidema, ruza kaj malica. Vidante ke Limin-ferajejo estis elstara en metiarto, bonfama kaj prospera, li klopodis ĉiamaniere kunigi sian metiejon kun Limin-ferajejo sed vane.

Poste, Ĝoŭ Vanli tamen sukcesis uzurpe transpreni Limin-ferajejon kaj forpeli Forĝiston Lu, per intrigo kaj premforto de lokaj kuomingtang-aj aŭtoritatuloj.

Dek kelkaj jaroj jam pasis, ĉar tio okazis antaŭ la Liberiĝo. Kie estas li nuntempe? . . .

“Tran — ĉil — akri — go — o!” Krioj alproksimiĝis de malproksimo. La voĉo estis tre familiara al mi, ŝajne ke mi ie ĝin jam aŭdis. Mia edzino ankaŭ diris al mi kun miro: “Aŭskultu, ĉu tio ne estas la voĉo de Forĝisto Lu?”

“Tranĉilakrigisto!” kriis mia edzino tra la pordo.

Envenis viro de alta staturato. Li apogis la vekton kontraŭ la muro, deprenis sian pajlĉapelon kaj per ĝi forte ventumis, sed ŝvito ankoraŭ striis malsupren de lia vizaĝo — ŝajne li laciĝis de multa marŝo.

“Ha, Maljuna Hu, ĉu vi ankoraŭ min rekonas?”

“Ha, vi estas Majstro Vang! Kiam vi revenis?” Mi estis tiel mirigita ke mi ne povis fidi miajn proprajn okulojn.


“Forĝ . . . Majstro Vang, sidiĝu, sidiĝu!” mia edzino alportis seĝon, kaj malfacile ektranĉis tabakfolion por la gasto.

“Mi revenis antaŭ du tagoj!” Lia vizaĝo estis ankoraŭ tiel ruĝa kiel antaŭe; nur al lia frunto aldoniĝis kelkaj sulkoj.

“Kie vi vivis dum tiuj ĉi jaroj?”

“Aj! Longa tempo estus bezonata por rakonti! — O, la tranĉilo breĉetiĝis, kaj neniuj riparistoj povis, ĉu ne?”

“Vere ja! kiel kapablulo en teknika renovigo, li tamen



Apud la urbo Langĝoŭ.

Lignogravuraĵo de Fej Guangtuo

ne povscias eĉ akriĝi kuirejan tranĉilon,” mia edzino mallaŭdis min montrante al li la tranĉilon.

“Mi vin helpu!” Li ekstaris. Stariginte blovilon kaj amboson, li komencis hejti la fornon.

“Kamarado Vang, sed vi ŝajnas esti tre laca!” Mia edzino transdonis al li la tranĉilon ne sen bedaŭro, kaj komencis alie titoli lin.

“Estas longa la rakonto!” Li metis la tranĉilon en la fornon, kaj komencis rakonti sian historion manipulante la blovilon. “Post la malfeliĉa okazaĵo en tiu jaro, mi forkuris al alia provinco, sin vivtenante kiel taglaboristo, kaj nur post la Liberiĝo mi eniris fabrikan.”

“Kial vi revenas nun?” demandis mia edzino scivoleme.

“Okaze de kampanjo por pliigi la produkton de ĉiutagaj bezonaĵoj, mi trovas nun vojon reveni al mia malnova metio!”

“Oni amasproduktas en fabrikoj manipulante elektrobotonon. Kiel facile!” mi diris.

“Ja tre facile, sed...” post mallonga paŭzo li daŭrigis, “Onklino Jang de la okcidenta fino skribis al la komunumo, ke oni devas porti la difektitajn kaldronojn kaj kuleregojn, kaj la breĉetitajn tranĉilojn kaj tondilojn al la urbo kelkdek liojn for, ĉar neniu ilin riparas ĉiloke, kaj ĉar ŝi multfoje petis ke la komunumo alsendu forĝiston, oni min revenigis ĉi tien.”

“Kiam vi komencos vian malnovan metion?” demandis mia edzino.

“Jen, ĉu mi ne jam komencas?” Li elpinĉis la brulruĝan kuirejan tranĉilon per tenaĵo kaj ĝin

metis sur la amboson. Per kelkaj martelbatoj, li faris la tranĉilrandon ebena kaj rekta. Post ekzameno, li ree metis la tranĉilon en la fornon.

“La negoĉejo establiĝos ĉe la orienta fino, kun la sama nomo de Limin-ferajejo. Tamen, ĝi estas nomata nun de la komunumo,” li emfazis precipe la lastan vorton, ridetante kun fiero. Baldaŭ li ree elprenis la kuirejan tranĉilon de la forno, kaj tuj ĝin metis en la akvon, sur kiu leviĝis fumo je siblado. Li nun volvis al si ankoraŭ cigaredon, sidante sur la ligna benko kiun li kunportis, kaj sur kies unu fino griza akriga ŝtono en formo de nova luno estis fiksigita. Fumante cigaredon, li ree ekparolis: “Ĉifoje la artikloj estos pli multaj; ni fabrikos plugilojn, falĉilojn, kaldronojn, kuleregojn kaj najlojn; krome, oni organizos ankaŭ migrantan servgrupon, kiu vizitos laŭvice al diversaj stratoj kaj vilaĝoj, por ripari ĉiutagajn uzaĵojn, kaj samtempe enketi la opiniojn kaj postulojn de la klientoj kaj ankaŭ kolekti eluzitajn feraĵojn...”

Li forĵetis la cigaredstumpon, kaj elakvigis la malvarmigitan kuirejan tranĉilon. Li akriĝis ĝin per puŝo kaj retiro, jen tiuflanke jen aliflanke, sur la akriga ŝtono, eligante ritman susuradon, kaj kaĉaĵo ekamasigis sur la ŝtono. Kiam li forviŝis la malpuraĵojn de sur la tranĉilo, aperis la brilanta tranĉilrando.

“Provu ĉu ĝi estas akra.”

Mi provis la tranĉilrandon. Dangere! Ĝi preskaŭ vundis mian fingron.

“Ege akra. Vi ja meritas la nomon Forĝisto Lu!”

Li ridetis kaj, kolektinte siajn ilojn, foriris.

“Tran — ĉil — akri — go — o!” malproksimiĝis liaj laŭtaj melodiazaj krioj.

Subscribe to

CHINESE LITERATURE

a literary monthly in English through which you will come to know Chinese literature and art

CHINESE LITERATURE brings you

— Novels, stories, poems, dramas, prose sketches and reportage by modern Chinese writers of different nationalities

— The best from China's treasure house of classical literature

— Folk songs, tales and fables of different nationalities in China

— Modern literary and art criticism

— Reports on cultural events

Every issue contains fine coloured reproductions of art works

Published by: Foreign Languages Press, Peking, China

Distributed by: GUOZI SHUDIAN, P. O. Box 399, Peking, China

La Bovo Jam en la Tero

(Popola Rakonto de Kinghaj-provinco)

EN LA VILAĜO, kie loĝis Akhu Tanpa, estis bienulo, kiu havis sennombrajn bovojn kaj ŝafojn, kaj vastan teron, sed ankoraŭ avidis ĉiam pli forte pri ĉio ĉi, dezirante ke ĉiuj kampoj kaj brutaroj en la mondo fariĝu liaj. Pro tio loĝantoj de tiu loko malamis lin ĝis la ostoj.

Iun tagon, grupo da intimaj amikoj de Akhu Tanpa, ĉiuj malriĉaj, venis al lia hejmo. Ili babilis kaj babiladis, kaj ĉiuj esprimis al li la deziron: havi manĝon de bovajo. Post iom da cerbumo, Akhu Tanpa diris al siaj amikoj:

“Bone, ĉi-nokte mi estos regalanto kaj invitos vin al manĝo de bovajo, kaj ni manĝu tiam kun bona apetito!”

Tamen, la amikoj ĉiuj sciis, ke Akhu Tanpa havas nek bovon, nek monon. Ili do lin demandis:

“De kie ni povos akiri bovajon?”

“Ne zorgu pri tio! Rimedon mi mem trovos!” respondis Akhu Tanpa tute certe.

Akhu Tanpa rapidis al la bienulo kaj diris al li:

“Mi venas por prunti bovon de vi, sinjoro.”

“Por kio vi bezonas ĝin?” arogante demandis la bienulo.

“Ĉar peco de mia tero estas ankoraŭ ne plugita!”

“Nu—,” la bienulo respondis tranaze kaj sekvigis: “sed vi devas pagi por la prunto.”

“Kompreneble! Kaj mi pagos laŭ via regulo.”

“Laŭ mia regulo? Ne! Nun estas tempo de okupateco de kampaj laboroj, ĉiuj ja bezonas bovon. La lupago devas esti duobla!”

“Konsentite, ĝin duobligu!” Akhu Tanpa respondis senhezite. Logate de la vorto “duobligu” la monavida bienulo tuj donis konsenton kun ĝojo.

“Iru mem preni la bovon!”

Akhu Tanpa eniris la bovostalon de la bienulo kaj elektis bovon grasan kaj grandan kaj ĝin tirante iris hejmen. Sed irinte ne longan vojon li revenis al la bienulo kaj diris:

“Sinjoro, mi trovis, ke tiu-ĉi via bovo ne estas obeema. Kiam mi irigis ĝin preter la kampo, ĝi forte volis nur eniri en la teron. . . .”

Ne atendante la finon, la bienulo furioze koleris:

“Sensencaĵo! Kiu en la mondo aŭdis ke bovo povas eniri en la teron?”

“Tamen vere, sinjoro. Mi neniam mensogas.” Akhu Tanpa kontraŭparolis kvazaŭ maltranquilla.

“Iru for! Se estus vere, mi ne plu kalkulus ĝian ekziston.”

Aŭdinte tion, Akhu Tanpa sen pluaj vortoj rapidis hejmen kun la bovo.

Atinginte sian domon, li tuj ordonis siajn amikojn buĉi la bovon. Tiun nokton, li bone re-

galis ilin. La reston de la viando li eĉ distribuis inter la najbaroj po tri aŭ kvin ĝin-oj, por ke ili ĉiuj manĝu ĝis kontento.

La sekvintan tagon Akhu Tanpa senbrue portis la bovooston al la kampo. Ĝuste en tiu momento, li vidis la bienulon iranta al li. Akhu Tanpa haste plantis la voston en la teron kaj ambaŭmane ĝin tenante sin ŝajnigis, kvazaŭ li estus forte ĝin tiranta, kaj li kriis senĉese al la alvenanta bienulo:

“Helpu! Helpu! Via bovo jam iris en la teron! Rapidu!”

Je la krioj, la bienulo kuregis antaŭen por helpi Akhu Tanpa-n, sed antaŭ ol li ektiris forte, Akhu Tanpa jam eltiris la voston kaj falis surdorsen, kvazaŭ li uzus tro da forto. Kaj teren falis ankaŭ la bienulo. Akhu Tanpa leviĝis lacece de sur la tero kaj diris al la bienulo, forbatante la polvon de sia vesto:

“Domaĝe! Ni rompis la voston! Mi diris jam antaŭe ke tiu-ĉi via bovo estas malobeema! . . .”

La bienulo kvazaŭ paralizigis kaj leviĝis pene nur postlonge. Liaj avidaj okuletoj fikse rigardadis la “rompitan” voston de la bovo kaj subite ekploregis. . . .



FABLAJ POEMOJ

S. J. Zee:

Kio Estas pli Fidinda?

De la piedoj, por ŝuoĉeto,
Mezuron prenis homo per ŝnureto,
Sed li forgesis ĝin sur la sidilo
Antaŭ la forveturo al foiro.
Kiam li faris jam por si elekton,
Malkovris li ĉagrene la neglekton.
Enkore sin malbenis la bonulo
Kaj tuj rapidis hejmen por la ŝnuro.
Sed ĉe l' returno de la hejmeniro,
Disiĝis jam delonge la foiro.

"Kial ne provis vi per la piedo?"
Iu najbar' demandis senkomprene.
"Ne, mi preferas fidi je l' ŝnureto
Ol la piedon," diris li solene.

(Laŭ fablo el Han Fej Zi)

Sama Konsilo Efikas Jam Malsame

La tera muro de riĉula domo
Disfalas parte sub pluvega duŝo.
La breĉo vekus, kiel virinbuŝo,
Deziron de aventurema homo.

"Se malfruiĝus necesa riparo,
Okazos nepre ŝtelista vizito,"
Patron avertis sian la mastrido.
La samon opiniis kaj najbaro.

Nokte efektiviĝis la konjekto,
Kaj multe perdis la nabab' vilaĝa.
Oni admiris tre la filon saĝan,
Sed la najbaron juĝis kun suspekto.

(Laŭ fablo el Han Fej Zi)



La Helpema Kamparano

Bonkora kamparano en Song-lando
Trovis la rizon kreski malrapide.
Dronintan en medito ĉe l' kamprando,
Bona ideo trafis lin subite.

Inter la sulkoj li atente iris,
Ankoraŭ freŝajn de la rosa bano,
Li iom supren la trunketojn tiris,
Kiuj "ekkreskis" sub la flega mano.

Ĉe vesperiĝo li sin hejmen trenis,
Mortlaca kaj en ŝvitpeza ĉemizo.
"Hodiaŭ mi tre multe tie penis
Por helpi kreski al la juna rizo!"

Rakontis li kaj ĉe l' manĝtabl' eksidis.
"Labor' laciga!" gruntis li kun ĝemo.
Tuj tien kuris la filo kaj vidis:
La rizo velkis — dank' al la helpemo!

(Laŭ fablo el Meng Zi)



La Lanco kaj la Ŝildo

Lancon kaj ŝildon iu vendis
Sur vendoplaco kaj kvalitojn
Mirindajn laŭte rekomendis
De la armiloj prezentitaj.

"Similan lancon vi ne trovos
En tuta lando, ĉar nenio
Al ĝia frap' rezisti povas
Sen pun', je mia garantio!"

Kaj el plej bona bronz' kaj led,
La ŝildo ĉiam staras firme
Kontraŭ lancfrapo aŭ ŝtonjeto
Kaj tiel vin protektos ŝirme."

"Bonvolu doni al mi ŝancon
Provi l' nerezisteblan lancon
Kontraŭ la ŝildo ĉionspita!"
Flegme parolis viro sprita.

(Laŭ fablo el Han Fej Zi)

La Problemo de la Internacia Lingvo

kiel Ilo de Sciencaj Interrilatoj kaj Sciencaj Verkoj en Geografio

Tiu ĉi artikolo estas konciza traduko de la verkintoj (geografoj de Sovetunio) el la revuo "Informoj de Sovetia Geografia Societo", 1961, n-ro 4. Pro limigo de la spaco ni ĝin publikas kun plia mallongigo. Ankaŭ la substrekoj estas niaj. — La red.

L A DEMANDO PRI APLIKADO DE LA INTERNACIA LINGVO EN SCIENCAJ STUDOJ DE GEOGrafoj HAVAS TEEGE GRAVAN SIGNIFON.

Malfacilaĵoj, ligitaj kun la multlingveco malhelpas al geografoj, same kiel al sciencistoj de aliaj fakoj legi tutmondan literaturon, malaltigas la nivelon de sciencaj verkoj, forprenas multege da tempo por lernado de lingvoj, kaŭzas grandegajn elspezojn por eldonado de tradukoj, presado de resumoj kaj referatoj, malhelpas la senperajn interrilatojn de sciencistoj ĉe internaciaj kongresoj kaj simpozioj.

EN LASTAJ JAROJ LA LINGVAJ BARIEROJ RAPIDE KRESKAS. Antaŭ 30-40 jaroj sufiĉis scipovi 2 aŭ 3 ĉefajn okcidenteŭropajn lingvojn por fakte esti informita pri la lastaj sukcesoj de la scienco. Nun en diversaj landoj ĉiam pli disvastiĝas la studado de rusa lingvo.

Tamen la afero ne finiĝas. La plej gravaj novaj faktoj pri diversaj fakoj de sciencoj estas publikataj nun en itala, ĉeĥa, japana kaj aliaj lingvoj. La renaskiĝo de la estintaj koloniaj kaj dependaj landoj rezultiĝas en ili intensan floradon de la scienco. En vico de fakoj, inkluzive proksimaj al geografoj demandoj de la grundplibonigo, estas malfacile elimini la ĉinan lingvon. La vekigi de la latinamerikaj landoj havigas unuagradan signifon al la hispana kaj la portugala lingvoj. Hindio jam deklaris, ke ek de 1965 ĝi rezignos de la uzado de la angla lingvo kiel lingvo oficiala kaj transiros al la hindi-lingvo. En la kampo de scienca interkomunikiĝo proksimiĝas la vera epoko de babela turkonstruo. La tasko ekposedi ĉiujn necesajn lingvojn fariĝas por sciencisto evidente superforta. Se li volas ellerni almenaŭ la ĉefajn lingvojn, li devas dediĉi al tiu ĉi neproduktiva okupo konsiderindan parton de sia vivo malprofite al krea laboro en la kampo de sia ĉefa fako.

Por faciligi la sciencan interŝanĝon, ĉiam pli larĝe disvastiĝas la praktiko traduki alilandan literaturon. Sed post elspezo de granda kvanto de mensa kaj fizika laboro, materialoj kaj elektroenergio, la rezulto kutime estas iom malpli bona ol la originala libro aŭ artikolo.

Aperas ankaŭ ĉiam pli grandskala eldonado de referaj revuoj kaj ĉiuspecaj bibliografiaj informolibroj. Tiucele oni kreas grandajn specialajn institutojn.* Tamen tiuj revuoj kaj aliaj bibliografiaj eldonaĵoj ne solvas la problemon de lingvaj barieroj. En la plimulto de okazoj referato nur montras, ke iu libro aŭ artikolo devas esti plene tradukita. Ĝi liberigas nin de la devo traduki ne bezonatajn verkojn, sed ĝi ne anstataŭas plenan tradukon de la necesaj. Krome, en referatoj renkontiĝas eraroj kaj mankoj. Ĉar ni ne havas spertulojn de 50 lingvoj, kiuj samtempe estas specialistoj en ĉiuj sciencoj.

Ĉe internaciaj kongresoj oni tradukas ĉiun raporton aŭ eldiron laŭvice en "ĉefajn" lingvojn, supozante, ke ĉiuj ĉeestantoj scipovas unu el ili, aŭ provizas la halon per specialaj telefonizitaj kabinetoj, en ĉiu el kiuj tradukisto legas antaŭ mikrofono la tekston de la raporto en iu el lingvoj de ĉeestantoj kaj la kunsidanoj havas sur siaj seĝoj aŭskultilojn, kiujn ili povas enŝalti en disaŭdigon el iu ajn kabineto.

En la unua maniero, oni perdas grandan kvanton da tempo. En la dua maniero, la telefonizado de la halo kaj la organizo de multlingva tradukado postulas grandegajn elspezojn. Krome, praktike oni povas apliki tiun ĉi manieron nur por tradukado de anticipe verkitaj raporto.

Ĉiujn ĉi maloportunaĵojn kaj barojn la geografoj sentas tre akre. Pro la karaktero de sia laboro, ili pli ofte ol aliaj specialistoj devas veturi alilanden. Ĉiujare kreskas la nombro de la internaciaj kongresoj, konferencoj, simpozioj, kiujn la geografoj partoprenas. Fine, la plej grava devo de geografoj estas verkado de sciencaj monografioj kaj popularaj libroj pri la naturo, ekonomio kaj loĝantaro de fremdaj landoj.

NI PRIDISKUTU LA EBLAJN ELIROJN EL LA PEZA SITUACIO. La propono rekoni kiel internacian

** En la redakcio de la serio Geografio sola laboras ĉirkaŭ 50 homoj, prilaborantaj referatojn, liveratajn per 1000-1500 hejmaj tradukistoj. La serio publikigas ĉirkaŭ 40,000 referatojn kaj komentariojn ĉiujare. (Noto de la verkintoj).*

lingvon de la scienco unu el la ĉefaj naciaj lingvoj estas tute nereala. Tia rekono egalus la rekonon de supereco de la kulturo, la sciencaj atingoj kaj la teknika progreso de unu nacio (aŭ grupo de nacioj de komuna genia deveno). Sed tia supereco fakte ne ekzistas kaj en la historio neniam ekzistis. La kreskinta nacia konscio de la popoloj neniam permesos al ili paciĝi kun la penso, ke ilia patria lingvo estas lingvo de "duagrada kvalito".

La problemo de la internacia lingvo staras plej akre por la popoloj de Azio kaj Afriko. La delegitoj de la konferenco en Bandung parolis en 60 lingvoj, apartenantaj al plej diversaj lingvaj grupoj. Neniu el ĉi-lingvoj estas disvastigita ekster siaj landlimoj, neniu povas pretendi la rangon de internacia. Oni povas imagi la sentojn de delegitoj, kunvenintaj por

pridiskuti metodojn de liberiĝo el koloniisma ĝeno, kiam por interkompreno ili devis uzi la lingvojn de koloniistoj!

La proponoj restarigi kiel tutmondan la latinan lingvon, ludintan tiun ĉi rolon en la Mezepoko kaj la Renesanco, tuŝas la prestiĝon nek de la grandaj, nek de la malgrandaj nacioj kaj havas nenian politikan nuancon. Tamen ankaŭ ili estas nerealigeblaj, kvankam pro aliaj konsideroj. En la XIX-a jarcento la evoluo de sciencaj ideoj progresis kun tia rapideco, kiun la adapto de la latino ne povis elteni. Nun, por galvanizi tiun ĉi lingvan kadavron kaj adapti ĝin al bezonoj de la scienco, oni devas enkonduki en ĝin pli da novaj vortoj, ol ĝiaj malnovaj. Tiam ĝi fariĝus fakte artefarita lingvo, intence kaj senbezone malsimpligita per komplikita komplekso de neregulaj verboj, multnombraj tempoj kaj gerundioj, tri seksoj de substantivoj, malkomforta sintaksa strukturo ktp. Ne, se oni devas krei internacian lingvon, estas preferende krei lingvon simplan, logikan kaj flekseblan, konforman al la epoko de la cibernetiko, nuklea fiziko kaj kosmonaŭtiko!

Tiamaniere ni logike venas al la ideo uzi Esperanton—la solan artefaritan lingvon, kiu eltenis 70-jaran provon en la praktiko, estas aplikata en sciencaj presitaj verkoj kaj senperaj kontaktoj, havas literaturon nombrantan dekmilojn da titoloj, estas lernata kaj uzata de multaj homoj en diversaj landoj.

LA UZADO DE ESPERANTO KIEL LINGVO DE LA SCIENCO SOLVAS TUJ ĈIUJN SUPREMENCITAJN MALFACILAĴOJN. Kiel pruvis la eksperimentoj de instruado de Esperanto en la lernejoj kaj la universitatoj, por ĝia ellerno oni bezonas meze 12-oble malpli da tempo ol por ellerno (ĝis sama grado) de iu ajn nacia lingvo. Dank' al sia precizeco, fleksebleco kaj kapablo senfine pliriĉiĝi per novaj terminoj, Esperanto sendube, estas la ideala lingvo de la scienco.

Dum lasta tempo aperis espero, ke internaciaj kontaktoj estos faciligitaj helpe de maŝintraduko. Sed tiu metodo tute ne solvas la problemon de multlingveco.

Nun Esperanto estas uzata interalie en la kampo de la geografio, kvankam ankoraŭ tre nesufiĉe. Ekzistas la Internacia Geografia Asocio (IGA), kiu unuigas esperantistojn-geografojn, klimatologojn, geologojn, arĥeologojn kaj simple amatorojn de vojaĝoj. Ĝi havas siajn reprezentantojn en multaj landoj. Ĉiujare ĝi organizas konferencon de la geografoj-esperantistoj. Ĝi eldonas ankaŭ *Geografian Revuon*. Krome, en diversaj landoj estas eldonataj kelkaj turismaj esperantaj revuoj. Abundan kaj interesan geografian materialon pri siaj landoj publikas la gazetoj, eldonataj en popoldemokratiaj landoj: *El Popola Ĉinio*, *Nuntempa Bulgario*, *Vietnamio Antaŭenmarsas* kaj aliaj.

Petro Poliŝĉuk:

Kia Estas la Devo de Esperanta Poeto

*Ni povas pri noktoj plenumaj paroli,
pri kant' najtingala en densa arbaro,
sed antaŭ ĉio ni devas memori,
ke "pacon eternan" soifas homaro.*

*Ho, mia animo, anim' komunista,
ĉu povas mi havi sentojn lirikajn,
se kiel rabbestoj turmentas rasistoj
la negrojn kaj hindojn sudafrikajn?*

*Ĉu povas mi mian animon instigi
al plena belarto per ia rimedo,
se la militistoj intencas mortigi
trionon da homoj sur nia planedo?*

*Ĉu povas mi okupi min pri amuzo
aŭ verki versaĵojn pri kora ĉagreno,
se monstro faŝisma en sia frenezo
minacas nin per bomb' hidrogena?*

*Ne! Tute ne povas mi esti trankvila
kaj esti al sorto malbona humila,
ĝis kiam ekzistas en mondo fantomo
de tria milito, milito atoma!*

*Pro tio en miaj versaĵoj mi vokas
homaron al lukto-batalo porhoma.
Mi vokas kaj homoj al mi reciprokas:
"Pereu por ĉiam minaco atoma!"*

*Mi vidas estonton belegan kaj klaran,
mi vidas feliĉan kaj gajan homaron,
kaj sent' de la amo, la am' reciproka,
ja estu spirito de nia epoko!*

Temaro proksima al geografio renkontiĝas ankaŭ en ĝenerala scienca gazeto *Scienca Revuo* kaj periodaj sciencaj artikolaroj *Sciencaj Studoj*, kiuj komencis publikiĝi en 1958-a.

Estas malfacile nomi ĉiujn geografiajn esperantajn librojn. Ni indiku por ekzemplo nur *Rigardu la teron* de Van Loon, *Skizo de Ekonomia Geografio* de F. Horrabin kaj *Pollando*. Dum lastaj jaroj estas publikitaj landpriskribaj monografioj, artikolaroj kaj informaroj en Polio, Bulgario, Vietnamia Demokratia Respubliko ktp. Ekzistas ankaŭ esperantaj broŝuroj pri apartaj atentintaj regionoj. En kelkaj landoj oni presas en Esperanto fervojajn horarojn.

Somere oni en multaj landoj organizas ankaŭ geografiajn tendarojn kaj ekskursojn.

Esperanto elmontris sin kiel eksterordinaire utila lingvo por instruado de geografio. Kiel ekzemplo povas servi la Geografia fakultato de la Pedagogia lernejo en Teŝin (Pollando). La rondeto de esperantistoj en tu ĉi fakultato (kaj al ĝi apartenas preskaŭ ĉiuj studentoj kaj multaj profesoroj) korespondas pri

geografiaj demandoj kun kolegoj el multaj landoj. La korespondado estas akompanata per interŝanĝo de libroj, mapoj, kolektoj. La ricevitaj objektoj ebligis krei ĉe la lernejo interesan geografian muzeon kun originalaj eksponaĵoj. Vizitoj al la lernejo de alilandaj esperantistoj, alvojaĝantoj Pollandon, fariĝis tradicio. Ili rakontas al la studentoj pri siaj landoj. Somere interŝanĝe la studentoj faris ekskurson al Ĉeĥoslovakio kaj intencas daŭrigi la studvojaĝojn alilanden. La facila realigebleco de la internacia komunikado per Esperanto kaj la senpera kolektado de materialoj eksterordinaire altigis la intereson de la estontaj instruistoj pri geografio, faris ilin veraj entuziasmuloj de sia profesio.

Estas pruvita la grandega utilo, kiun Esperanto povas fari por la scienc-teknika helpo, praktikata inter la landoj de la socialisma tendaro.**

** Pri tiu problemo vidu la artikolon de D. Armand "La Internacia Lingvo en Servo de Socialismaj Landoj", presita en "Nuntempa Bulgario", n-ro 5/1959. (de la verkintoj).



GRAVA PETO



al ĉiuj niaj amikoj

Kredeble ĉiuj niaj amikoj kaj kunlaborantoj memoras, ke nia gazeto tuj travivos plenajn kvin jarojn de sia dua periodo. Ĝia ĉiam pli sana kreskado multe ŝuldas al ĉiuj viaj fervoraj helpoj kaj kunlaboroj. La pli kaj pli vasta aplikado de nia kara internacia lingvo — Esperanto en Ĉinio donas grandan promeson por nia espero. Tamen por atingi plenan sukceson, ni devas ankoraŭ multe klopodi por konvinki la vastan publikon ankoraŭ indiferektan, ke nia lingvo havas vere grandan utilon por interkompreno inter la popoloj kaj por batalo de la paco, ke nia lingvo fariĝas jam vere internacia kaj povas atingi ĉiujn angulojn de la mondo, ke niaj laboroj ne estas dronitaj seneĥe sed male ricevas varmajn akceptojn kaj diskonigojn de la legantoj. Tial ni intencas aranĝi imponan Esperantan Ekspozicion en la

kuranta jaro. La ĉefajn materialojn ni atendas de vi, ĉiuj niaj legantoj, amikoj kaj kunlaborantoj. Dezirataj estas diversaj materialoj pri utiligoj de *El Popola Ĉinio* kaj aliaj niaj eldonaĵoj, ekz-e, gazetoj, ĵurnaloj sur kiuj aperis viaj tradukoj aŭ represitaj tekstoj el niaj eldonaĵoj aŭ recenzoj pri ili, fotoj montrantaj legadojn, ekspoziciojn aŭ prelegon pri aŭ laŭ materialoj de niaj gazeto kaj libroj. Eĉ simplaj informoj tiaj multe helpas al la celo. Al ĉiuj, kiuj sendos al ni la deziratajn materialojn ni donacos belan memoraĵon. Ni esperas, ke ĉiuj niaj amikoj ne avaros siajn helpajn manojn kaj laŭeble kaj diversmaniere akiros por ni la bezonatajn materialojn. Ĉio por la ekspozicio adresu al nia Redakcio (P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio) kaj notu sur la koverto "Por ekspozicio".



La Redakcio de EL POPOLA ĈINIO



En Ĉinio kaj Vietnamia Demokratia Respubliko oni al specialistoj el okcidentaj socialismaj landoj aldonis interpretistojn-esperantistojn. Ĉiu laboro de la specialisto efektiviĝis helpe de traduko el esperanto al ĉina aŭ vietnama lingvo. Tiu ĉi sperto pruviĝis plenprospera.

Estas interese indiki la okazojn de uzo de Esperanto en neesperanta literaturo. Dekoj da diversfakaj sciencaj revuoj en Italio, Belgio, Japanio, Brazilio kaj aliaj landoj donas esperantajn resumojn. Plej grandan sperton havas la solida revuo *Revista Brasileira de Geografia*, eldonata de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko. Ĉi revuo dum 20 jaroj presis tre detalajn resumojn de pli gravaj artikoloj en Esperanto. La modesta iniciato apartenas al *Geografiaj Demandoj*—organo de Moskva Filio de Geografia Societo de USSR, eldonata per Ŝtata Eldonejo de Geografia Literaturo. Ek de 43-a numero (1959) la enhavo de *Geografiaj Demandoj* estas presata ankaŭ en Esperanto kaj la angla lingvo krom la rusa. Jam estas ricevitaj unuaj aprobaĵoj resonantaj el eksterlando kun informoj, ke esperantaj enhavoj helpas al alinaciaj kolegoj konatiĝi kun temoj de artikolaroj.

Plioftiĝas la okazoj de uzo de Esperanto en internaciaj neesperantaj kongresoj. Ekz-e antaŭ du jaroj la konferenco de popolaj universitatoj en Firenca renkontis la obstaklon: por konigo de ĉiuj partoprenantaj landoj kun materialoj de la konferenco oni devis inviti 27 tradukistojn. Sed la monrimedoj tion ne permesis. Tiam oni agnoskis sufiĉe traduki la materialojn nur en Esperanton. Du tradukistoj facile solvis ĉi-taskon.

KVANKAM JAM MULTO ESTAS PREPARITA KAJ EĈ FARATA POR APLIKI LA INTERNACIAN LINGVON EN LA GEOGRAFIO, ONI DEVAS FARI MULTE PLI. La eldono de originala kaj tradukita geografia esperanta literaturo estas detenata per limigita kvanto de legantoj. La plimultiĝo de geografoj-esperantistoj rezultigos rapidan kreskon de aŭtora kaj eldoneja aktiveco. Eĉ nun ekzistas pluraj aŭtoroj, kiuj volonte publikus siajn verkojn en Esperanto, sed ili timas ke ĉi-verkoj estas tralegitaj nur per malmulta kvanto de kolegoj. Tamen, ĝuste la uzo de Esperanto povas solvi la problemon de publikado de strikte specialaj verkoj, kiuj nun estas forpuŝataj per eldonejoj pro sia malprofiteco. Vere, la rondo de iliaj legantoj en ĉiu sola lando estas tre mallarĝa. Presote en lingvo, komprenebla por scienlistoj de ĉiuj landoj, ili povos disvendiĝi en pli granda preskvanto kaj sen malprofito.

Do, por la unua paŝo, oni devas agnoski Esperanton kiel lingvo, uzata por internaciaj kontaktoj, lingvo per kiu efektiviĝas scienca korespondado kaj

presigaĵoj de artikoloj. Se tiaj decidoj estus akceptitaj per naciaj geografiaj societoj kaj institutoj, tio stimulus la amasojn de geografoj lerni la internacian lingvon, kaj la rondo de legantoj de en ĝi eldonata literaturo rapide disvastiĝus.

Tre grave estas ebligi la partoprenon de kvalifikitaj geografoj en la Internacia Geografia Asocio, plivastigi kaj fari pli scienca la gazeton *Geografia Revuo*. Estas necese, ke oni okupu sin pri la prilaboro de esperanta geografia terminaro. La laboron pri verkado de geografiaj vortaroj faras apartaj esperantistoj-geografoj en Francio, Bulgario, Pollando kaj USSR, sed ĝi estas malfacila por sola homo; tie ĉi estas postulataj la klopodoj de profesia kolektivo.

Unu el la plej urĝaj taskoj estas la ordigo de esperanta transskribo de geografiaj nomoj kaj eldono de internaciaj mapoj. La simpla kaj klara fonetiko de Esperanto ebligas elekti sufiĉe proksime sonantan skribon de la diverslingvaj nomoj. Estas eble, ke la komparado kun ili helpas unueciĝi la transskribon de alilandaj nomoj ankaŭ en la naciaj lingvoj.

La plua disvolviĝo de la aplikado de Esperanto, verŝajne, devas trapasi du etapojn.

1-a etapo. Esperanto estas akceptata kiel internacia lingvo por referado de scienca literaturo. En tiu ĉi okazo la verkado de la referaĵoj estas farata ne en la lando, kiu interesiĝas pri iu ajn verko, sed en la lando, en kiu ĝi estas verkita. Plej simple estas, ke la aŭtoroj mem farus la referadon en Esperanto. Diference de aliaj lingvoj, tute bone povas verki en Esperanto ĉiu, kiu dediĉis kelkajn monatojn por ĝia studado. Cetere, neniu povas prezenti en konciza formo la enhavon de sia scienca verko pli precize kaj pli bone ol la aŭtoro mem. En tiu ĉi okazo la funkcio de la refera gazeto reduktiĝus al represo de la resumoj el gazetoj kaj libroj, ilia sistemigo kaj ekspedado al oficejoj kaj personoj en la tuta mondo, abonintaj la respektivajn seriojn. Organizinte la laboron tielmaniere oni plene eliminus erarojn kaj mankojn en la referatoj. La elspezoj de la bibliografiaj institutoj kaj eldonejoj estos reduktitaj kelkdekoble.

Dum la sama etapo estas grave plivastigi la instruadon de Esperanto en lernejoj. En Bulgario, Polio, Finnio, Britio, Danio kaj kelkaj aliaj landoj jam ekzistas lernejoj, kie lernantoj povas laŭvole studi Esperanton. En USSR en kelkaj mezlernejoj ekzistas esperantaj rondetoj.

2-a etapo. Post la sufiĉa disvastiĝo de la Internacia Lingvo inter sciencistoj estos celkonforme, ke la sciencaj verkoj tuj kaj plamplekse estu verkataj en Esperanto. Tiam al ĝi transiros en formo, respondanta al modernaj postuloj, la funkcioj dum multaj jarcentoj plenumaditaj per la latina lingvo.

S-ro C. Linusson el Svedio interesiĝas pri tiu ĉi demando kaj deziras iom informiĝi pri detaloj de la afero, jen ni citas ĉefajn punktojn de la koncerna regularo. Espereble tio kontentigos lin kaj similajn interesiĝantojn.

— La Red.

Rajtas emeritiĝi laboristoj kaj oficistoj kies kondiĉoj konformas al la jenaj:

1. Laboristo aŭ oficisto kies aĝo atingis 60 jarojn kaj kies sinsekvaj labor-jaroj atingis 5 kaj ordinara labor-jaroj atingis 20 (la ordinara labor-jaro inkluzivas la diritajn sinsekvajn labor-jarojn); laboristino kies aĝo atingis 50 jarojn aŭ oficistino kies aĝo atingis 55 jarojn kaj por ili ambaŭ la sinsekvaj labor-jaroj atingis 5 kaj la ordinara labor-jaro atingis 15.

2. Laboristo aŭ oficisto kiuj laboras en ŝakto, alte en aero en alta varmego, faras pezegan fizikan laboron aŭ laboron malbonefikan por sano kaj kies aĝo atingis 55 jarojn; laboristino aŭ oficistino kiu faras la samajn laborojn kaj kies aĝo atingis 45 jarojn. La normoj de atingendaj sinsekvaj kaj ordinara labor-jaroj por ambaŭ seksoj estas samaj kiel la supre diritaj.

3. Laboristo aŭ oficisto, kies aĝo atingis 50 jarojn, kaj laboristino aŭ oficistino kies aĝo atingis 45 jarojn, kun 5 sinsekvaj labor-jaroj kaj 15 ordinara labor-jaroj, tro malforta por labori aŭ perdinta la labor-kapablon laŭ taksado de la Labor-kvalifika Komitato aŭ laŭ atesto de kuracisto.

4. Laborist(in)o aŭ oficist(in)o kun 5 sinsekvaj labor-jaroj kaj 25 ordinara labor-jaroj, tro malforta por labori laŭ kvalifikita taksado aŭ laŭ atesto de kuracisto.

5. Gelaborantoj kiuj okupis sin ekskluzive pri revolucia laboro

por 20 jaroj kaj kiuj ne plu povas labori pro malforteco kaj deziras ekŝiĝi.

NORMOJ DE MONATAJ PEN-SIOJ:

1. La pensio por gelaboristoj kaj geoficistoj, kies kondiĉoj konformas al la punktoj 1-a kaj 2-a, kaj kies sinsekvaj labor-jaroj atingis 5 aŭ pli sed malpli ol 10, estas 50% de la monata salajro. Tiu por tiuj kun 10 sinsekvaj labor-jaroj aŭ pli sed malpli ol 15 estas 60%. Tiu por tiuj kun 15 sinsekvaj labor-jaroj aŭ pli estas 70%.

2. La pensio por gelaboristoj kaj geoficistoj kies kondiĉoj konformas al la punktoj 3-a kaj 4-a kaj kies sinsekvaj labor-jaroj atingis 5 aŭ pli sed malpli ol 10 estas 40% de la monata salajro. Tiu por tiuj kun 10 sinsekvaj labor-jaroj aŭ pli sed malpli ol 15 estas 50%. Tiu por tiuj kun 15

sinsekvaj labor-jaroj aŭ pli estas 60%.

3. La pensio por gelaborantoj kies kondiĉoj konformas al la punkto 5-a estas 70% de la monata salajro.

4. Gelaboristoj kaj geoficistoj kiuj faris specialan kontribuon por la bono de la socio povas, sub la sankcio de supera instanco, ricevi pli altan pension ol laŭ la supre-diritaj normoj, sed la aldonita sumo ne povas superi 15% de la monata salajro.

Ĉiuj pensiuloj rajtas ricevi pensiojn ĝis la morto. Poste, la familio de la mortinto ricevas 50 ĝis 100 juanojn kiel enterigan subvencion kaj krome, laŭ la nombro de la proksimaj parencoj (t. e., Gepatroj, edzo aŭ edzino kaj gefiloj) de li vivtenitaj ricevas monhelpon kiu egalas al la sumo de la antaŭaj pensioj por 6 ĝis 9 monatoj.

(Daŭrigo de p. 242)

kursos per 1 n-ro. Por ĉiu plia bk. aŭ 10 pm, alumet-etiketoj, glumarkoj vi ricevos plian n-ron, por konkursi al la 170 libroj.

2. Por konkursi samtempe al la abono al la 35 revuoj, sendu minimume 5 bk. aŭ 50 pm, alumet-etiketojn aŭ glumarkojn.

3. Vi povas sendi bk, pm, alumet-etiketojn kaj glumarkojn kiom da fojoj vi deziras. **Ju pli multe vi**

sendos, des pli multaj viaj ŝancoj.

Klubo povas partopreni amase, en la nomo de la klubo. Por la bildkartoj mi akceptas ankaŭ albumojn. Ne forgesu skribi preslitere vian adreson! Ĉion sendu antaŭ la 15-a de decembro 1962. Ĉiujn mi bone informos pri la rezulto de la konkurso.

Mia adreso: Gersi Alfredo Bays
Caixa Postal 49
XAPECÓ-SC,
Brazilo

Interatako per Mezaj Kanonoj

POST la legado de niaj antaŭaj artikoloj, multaj eble pensas: "Sed kiel oni ludas la ĉinan ŝakon de la komenco ĝis la fino? Estus dezirinde doni tian ekzemplon." Nun ni publikigos sinsekve de tiu ĉi numero du mallongajn sed streĉajn partiojn kun necesaj komentarioj por ke la legantoj havu en sia kapo ĝeneralajn konturojn pri la ludo de la ĉina ŝako.

Ni komencu de la malfermado de partio. Ni jam scias: *En la ĉina ŝako G kaj Ma—la celo de la batalo—ne rajtas eliri el la palaco. Tial por minaci aŭ matigi la kontraŭflankan G aŭ Ma la plej ofte uzata strategio estas interrompo de la mezo. La movo, kiu ebligas premon ĉe la meza linio jam de la malfermo de la partio, estas tiu de K.* Frue en la 15-a jarcento niaj praavoj jam resumis la sperton de manovradoj laŭ tiu strategio en la verko *Ging Peng Pu* kaj proponis kelkdek batalplanojn per rimedo de "dento pro dento"—konata kiel "sistemo de malfermado per mezaj K-oj", t. e., kiam unu flanko movas la K-on al la 5-a linio, la alia flanko faras la samon. Ni donu ekzemplon sube:


Ĉa sur Horizontalo kun Forofero de Ĉe kontraŭ Rivertranspasinta Ĉa sur Vertikalo (Tipo de Mezaj K-oj de la Sama Alo)

1. K c8—c5, K g8—g5. Nun se la nigra 2. K c5 : f5 +, la ruĝa ne devus sekvi la ekzemplon elimini la kontraŭan P-on per K. Ĉar se la ruĝa efektive 2. . . . K g5—ĉ5, tiam 3. K f5—d5!—la retroira vojo de la ruĝa K estus barita, kaj en la posta paŝo kiam Ĉe a8—c7 por kapti la ruĝan K mezan, kaj la lasta fuĝus de la mezvertikalo, ekz. K. ĉ5—

ĉ4, la nigra K c2—c5 +, kaj la ruĝa povus nur K ĉ4—ĉ5, oferi la saman K-on por savi sin, sed la situacio por ĝi fariĝus tre malfavora. Sed post kiam la nigra 2. K c5 : f5 +, la ruĝa povas 2. . . . Es h4—ĝ5 3. Ĉe a8—c7, Ĉe h8—g7 por forpeli la nigran K-on de sur la meza linio kaj pli frue movi sian Ĉa-on de h9. Tial ĉe tia partio kun K-oj kiel ĉefrolantoj oni ĝenerale ne volas urĝe elimini la mezan S-on (P-on) per la K, sed preferas unue movi sur la scenejon sian Ĉe-on aŭ Ĉa-on.

2. Ĉe a8—c7, Ĉe h8—g7. 3. Ĉa a9—b9, Ĉa h9—h8. 4. Ĉa b9—b4, Ĉa h8—ĉ8. 5. Ĉa b4—ĝ4, Ĉe h2—g1. La forsalto de la ruĝa Ĉe estas neevitebla, alie, la nigra Ĉa ĝ4—ĝ2 kaptos la ruĝan K-on g2, kaj, se tiu fortiriĝos, la nigra gajnos unu Ĉe-on de la rivalo per K c2 : h2. Sed kien saltu la Ĉe? Antaŭ la 18-a jarcento oni ĝenerale preferas la salton de la Ĉe al la rando. Sed per tiu paŝo ĝi longigas la distancon por interrili kun sia maldekstra Ĉe; fariĝas pli malforta la defendado en la meza linio; samtempe, la nigra Ĉa ĝ4 trovas sin en tre supera pozicio, tenante la dekstran alon de la ruĝa en obstrukcita, malfacile manovrebla stato.

6. Ĉa a1—b1! forcedante sian Ĉe a2. Sensperta rivalo ne povus deteni sin de eliminado de la oferaĵo, pensante en si: "Kian ruzajon vi povus kaŝi en tio?" Do, 6. . . . K g2 : a2. 7. K c2—g2. "Nu? Por ataki mian maldekstran Ĉe? Sed ĝi estas vivpova!" La ruĝa eble ridas kaŝe en si. Tial, 7. . . . Ĉe g7—h8. Kvankam la Ĉe fariĝas sekura, sed mankas al la meza S sufiĉa protekto, sekvos tuj uragano de interrompo de la mezo.



8. K c5 : f5 +, Es h6—ĝ5. 9. Ĉa b1—b4, Ma h5—h6 (kiel la bildo montras).

Kiel vi movus, se vi estus la nigra, karaj legantoj?

10. Ĉa ĝ4 : h4 + !! Eksterkonjekta kombinaĵo! Se la ruĝa 10. . . . Es ĝ5 : h4, tiam 11. Ĉa b4—b6 +, K g5—g6. 12. Ĉa b6 : g6 +, Ma h6—h5. 13. K g2—g5 X. Matigo de tiu tipo estas nomata "matigo per duoblaj K-oj".

10. . . . Ma h6—ĝ6. 11. Ĉa h4—ĝ4. La fronta Ĉa de la nigra retroiras unu paŝon minacante, kun subteno de sia meza K, ŝakigi per elimino de la ruĝa Es ĉe la centro, por poste Ĉa b4—b6 X.

11. . . . K g5—g3. La ruĝa forŝovas la apogilon de la meza K de la nigra, por ke la nigra Ĉa ne povu elimini la centran Es-on.

12. Ĉa b4—b6 +, K g3—g6. 13. K g2—g5, refoje havigante por la K f5 apogilon, por ke la Ĉa ĝ4 povu ŝakigi per elimino de la centra Es kaj matigi per Ĉa b6 : g6.

13. . . . K a2—g2 por protekti la K-on g6 ĝustatempe.

14. Ĉa ĝ4 : ĝ5 +, Ma ĝ6—h6. 15. K f5—f6 + ! K f6 : b6. 16. K g5—g6 X. Ankoraŭ "matigo per duoblaj K-oj" en la fino.

Bonvolu pardoni la legantoj, ke pro manko de spaco ni ne povas doni detale aliajn variaĵojn.

Heroaĵo de Unu Kasistino

TIO ĈI OKAZIS antaŭ mateniĝo, la 3-an de marto 1959j., en malgranda ĉelima urbeto Ĵujli, en la suda parto de Ĉinio. 17-jara Hju Hjuehuj, kasistino de filio de la popola banko, vekigis pro grin-cado de la seruro.

“Rabistoj”, ekpensis ŝi. En la malgranda dometo, kiu servis samtempe kiel oficejo kaj komun-loĝejo, la junulino estis sola. Ŝi havis nenian armilon, ŝia koro subite terurpremiĝis. Tamen la rabistoj — ses postrestantaj kuomintanganoj kiuj venis el eksterlando, jam ŝteliĝis en la ĉambiron. La junulino laŭte ekkriis. Unu el la rabistoj frapis ŝin per tranĉilo en la vizaĝo. Hju tuj svenis. Dum tiu tempo la kuomintanganoj trovis en la mallumo la kason. La metala kesto estis ŝlosita. Ili provis rompi la seruron. Re-konsciiĝinte Hju denove komen-cis kriegi. La malgranda, deli-kata junulino ne lasis el siaj ma-noj la keston, en kiu troviĝis 50,000 juanoj de ŝtata mono — salajro kaj monŝparoj de labo-ristoj. La furioziĝintaj kuomin-tanganoj forhakigis ŝiajn manojn. Sed dank’ al ŝia kriego alkuris

oficistoj de la ŝtata fabriko kiu troviĝis apude. Ili mortigis unu el la rabistoj kaj ceteraj forkuris.

Apud la kaso, la kamaradoj trovis Hju Hjuehuj sanganta. Sur ŝia korpo estis ok tranĉilaj vundoj. Oni forveturigis la junan heroinon en malsanulejon. La kuracado iris sukcese kaj jam post 3 monatoj la junulino povis ellitiĝi.

Informo pri la heroaĵo de la kasistino ĉirkaŭflugis tutan Ĉinio.

Oni elektis Hju kiel delegitino de la unua Tutĉinia Kongreso de Labormodeloj. Sidante en salono de la tutĉinia kunveno de la popo-laj reprezentantoj la junulino denove kaj denove pensis pri sia estonteco malĝoje. Frue komen-cigis ŝia labora vivo. Ŝi laboris jam 3 jarojn, sed ĝi same tiel frue interrompiĝis.

Kvazaŭ responde je tiu ĉi demando venis letero de O.O. Romanov, direktoro de la Protez-membra Farejo de Ĉita. Romanov invitis la ĉinan junulinon en Sovetunion, proponis prepari por ŝi protezajn manojn.

Rapide pasis 3 semajnoj en Sovetlando. Kune kun la artefaritaj manoj al la junulino revenis ĝojo kaj memcerteco.

Romanov rakontis al ŝi pri si mem. Ankaŭ li estis grave vundita kaj ankaŭ li perdis la manojn. Ne estis facile reveturiĝi hejmen kiel kriplulo, sed la Partio kaj registaro komisiis al li noblan aferon.

Romanov serĉadis spertajn laboristojn, klopodis por akiri bezonajojn — aranĝis metiejon, kiu estis tiel bezonata por centoj da partoprenantoj de la patruja milito.

Dum la zorgo pri la fremda mal-feliĉo, li forgesis la sian.

Hju ricevis tri parojn da protezaj membroj: iloj por fizika laboro, por laboro, kiu postulas certajn, ĝustajn movojn kaj artefaritajn manojn. Dum la adiaŭa bankedo, aranĝita de sovetiaj amikoj, Hju jam povis manĝi sen alies helpo.

“Eterne verda amikeco de la ĉina kaj sovetia popoloj” — tiuj ĉi estis la unuaj vortoj skribitaj de Hju Hjuehuj, kiam ŝi denove ekprenis krajonon en siaj manoj.

Tradukis el la ukraina lingvo

A. Kalaŝnikova

Hju Hjuehuj prezentas al la vizitantoj la artefaritajn manojn instalitajn en Sovetunio kaj donacojn de sovetiaj geamikoj.

La ĵus elvagoniĝintan Hju Hjuehuj tuj ĉirkaŭis la varmaj bonvenigantoj.



Pri la Skriba Alfabeto de Esperanto

POST LA PUBLIKIGO de la artikolo en la dua numero de nia revuo de la kuranta jaro "Ĉu Esperanto havas propran skribalfabeton?" verkita de k-do Oskar

Gardi el Sovetunio, venis pluraj artikoloj pri tiu ĉi temo. La ĝenerala opinio estas kontraŭ la propono de k-do Oskar Gardi. Jene ni resumas iliajn ĉefajn punktojn:

De k-do J. Stein (el Sovetunio): la propono ne estas ĝusta. Ne gravas ĉu la nuna skriba alfabeto de Esperanto estas vera latina aŭ ne. Kie kuŝas la maloportuno de la alfabeto? K-do Gardi plendas, ke 1-e kelkajn literojn oni skribas diversmaniere kaj 2-e por popoloj skribantaj per hieroglifaj, arabaj, hindaj k.a. signoj estas malfacile eklerni. Sed k-do J. Stein diris, ke por la 1-a punkto estas necese nur interkonsenti pri tio kiel oni povas (devas) skribi tiujn literojn, sed ne estas necese malestigi la uzatan alfabeton; pri la 2-a punkto li opiniis ke kreado de nova skribalfabeto ne liberigos la popolojn ne uzantajn latinan alfabeton en la lernado. Kaj krome kreante novan skribalfabeton oni devos krei ankaŭ konforman novan presalfabeton. Kaj tio signifas rekonstrui la tutan kulturon de Esperanto.

De k-do Ed. Dancis (el Sovetunio): Li opinias, ke la latina alfabeto estas ĝenerale konata ĉu laŭ propra gepatra lingvo, ĉu, ekster eŭropaj lingvoregionoj, laŭ ioma konatiĝo kun fundamentoj de iu latinalfabeta lingvo. Kaj la diferenco inter la skribmanieroj de apartaj literoj ne estas tiom esenca, ke ĝi malebligas la komprenon de skribaĵo almenaŭ laŭ kunteksto. Por la adresoj oni povas varme rekomendi la uzon de gumstampiletoj. Pri ornamoj de skribliteroj devenas ja de persona gusto de la skribintoj, kaj ĝin ŝanĝi ne estas facile.

De k-do Josef Pousek (el ĈSSR): La propono signifas dubi pri ekzisto de la skribalfabeto de Esperanto. Oni ja povas trovi la alfabeton de la fotokopioj de la originalaj leteroj de D-ro Zamenhof. Korespondantoj nur lernu la alfabeton, kiu jam estas plej simpla, facila kaj logika. Skribu legeble ĉion kaj la adresojn (kiel oni tion kutime deziras) per pres-

Niaj Danko kaj Donaco al Amikoj por la Paco

okaze de la 5-jara datreveno de la reapero de EPĈ.

Karaj legantoj kaj amikoj!

Nia modesta gazeto tuj travivos sian kvinjaran periodon post la reapero en 1957. En la ne tre longa tempo de kvin jaroj, ni sukcesis ion kontribui al la interamikiĝo de la ĉina kaj alilandaj popoloj, al la paco kaj al la esperanta movado. La sukceso apartenas al ni kaj ankaŭ al vi, karaj legantoj kaj intimaj kunlaborantoj. Por danki al via helpado kaj subtenado, ĝoje celebri kun vi la sukceson kaj akceli nian komunan aferon per pligrandigo de la leganto-amikaro, ni decidis:

- (1) redakti multkoloran altnivelan artalbumon de famaj ĉinaj pentraĵoj k. a. belartaĵoj kaj ilin donaci al:
 - a) ĉiu, kiu sukcesis varbi kvin abonantojn al nia gazeto (pli kvino, pli ekz.);
 - b) ĉiu, kiu aĉetas niajn E-librojn por minimume 10 \$US en unu fojo;
 - c) ĉiu aktiva kunlaboranto, kiu ofte utiligas materialojn el nia gazeto aŭ kontribuas al ĝi;
 - ĉ) ĉiu peranto de niaj eldonaĵoj.

(Proponoj de diverslandaj E-organizo kaj lokaj E-grupoj pri perado de niaj eldonaĵoj estas bonvenigataj. Krom grandprocentan rabaton, la akceptataj perantoj rajtas ricevi ankaŭ la belan donacon.)

(2) rajtigi al ĉiu, kiu sukcesis varbi por EPĈ minimume 2 jarabonantojn aŭ aĉetas de ni E-ajojn por minimume 5 \$US, senpage ricevi nian gazeton por unu plena jaro (se oni jam abonis al EPĈ por 1963, li rajtas ricevi la jarkolekton de 1964).

Ni devas vin atentigi, ke la eldonkvanto de la albumo estas limigita. Por certigi al vi la ricevon de ĝi, estas konsilinde eklabori tuj kaj anonci al ni vian sukceson ne malpli frue ol la jarfino de 1962.

La Administracio de EL POPOLA ĈINIO

literoj. Jen la praktika kaj simpla solvo!

* * *

Evidente, propono de ia ajn reformo pri Esperanto ĉiam incitas kiel kutime la esperantistojn kaj vekas ĝeneralan proteston. Efektive nenian reformon pri Esperanto oni devas paroli nun, kiam ĝi ankoraŭ ne estas ĝenerale akceptita internacie de la aŭtoritatoj, eĉ se reformendaj punktoj troviĝus en la lingvo. Tamen ekzameninte la artikolojn (inkluzive tiun publikigitan en *Nuntempa Bulgario*) de k-do Oskar Gardi, ni trovas, ke fakte li ne parolis pri ia reformo sed alvoko al la esperantistoj, ke ili ne tro plezuriĝu per la t.n. persona gusto aldonante ornamojn malfaciligantajn la legadon en la skribado de Esperanto, kiel oni ofte ren-

kontas en la korespondataĵoj. Tiurilate ankaŭ la manskribo de Zamenhof ne povas esti rigardata kiel modelo, kiel asertis k-do Josef Fouseko. Ja pluraj redaktoroj en nia redakcio ne povas legi iliajn originalajn manskribojn senpene kaj eĉ multajn vortojn el ili oni nur malfacile deĉifras kun helpo de la kunteksto, kvankam ili lernas la lingvon jam pli ol 30 (almenaŭ 20) jarojn. Fakte en la *Ekzercaro* estas alfabeto por manskriboj, sed ĝi estas malmulte atentata. En la plejparto de la lernolibroj (krom kelkaj eldonitaj en Orientaj landoj) ne troviĝas tiu ĉi alfabeto, kaj eĉ Zamenhof mem skribis senkonscie laŭ la nacia maniero aŭ persona gusto. Por ke la lingvo estu simpla, facila kaj tuj akceptebla ne nur prese, buĉe sed ankaŭ skribe, ni opinias, ke la atento de k-do Oskar

Gardi estas necesa, kaj tio neniel povus atenci la fundamenton de Esperanto. Eble la sola punkto, kiun oni povas konsideri kiel reformon estas la propono, ke majuskloj kaj minuskloj devas esti skribataj samegale kun diferenco nur en alteco (do kiel tio okazas ĉe la litero "o"). Kompreneble por tio oni devas fari novan interkonsenton ne facile atingeblan. Tamen tio kaŭzos laŭ ni ankaŭ nenian danĝeron al la kulturo de Esperanto, kaj ne necesigos kreon de novaj prestipoj, ĉar ĝi ja rilatas nur al manskribo.

Verŝajne plua diskutado pri tiu ĉi temo kondukos al nenio. Kaj **la praktika kaj simpla solvo eble estas nur tio, ke oni skribu legeble kaj la adresojn per presliteroj**, kiel k-do Josef Fousek konkludis.

— La Red.

Esperanto Marŝas



Regula Kunsido de Pekinaj Esperantistoj

La 24-an de junio, rekomenciĝis regula kunveno de pekinaj gesperantistoj kun freŝa energio. La unuan kunsidon ĉeestis 35 gesanoj kaj la duan, kiu okazis je la 15-a de julio por celebri la 75-an datrevenon de la naskiĝo de Esperanto, partoprenis ĉ. 60 personoj. Dum la kunsidoj, oni havis la plezuron aŭdi esperantan sonbendon de teatraĵo ludita de bulgaraj artistoj, paroladon de d-ro Lapenna sur gramofondisko, esperantajn kantojn kaj deklamadojn, kaj informojn pri la lastaj novaĵoj de la E-movado enlanda kaj eksterlanda. La libera babilado antaŭ kaj post la ordigitaj programeroj havigis al la ĉeestantoj eblecon praktiki esperantan konversacion kaj interkonatiĝi. Dum la dua kunsido

pluraj malnovaj esperantistoj, kiuj lernis Esp-on antaŭ pli ol 20 jaroj, parolis pri siaj spertoj rilate al la utilo kaj facileco de Esperanto, kaj tiel kuraĝigis la nove bakitajn s-anojn. Por akceli la buŝan uzadon de la lingvo, fondiĝis malgranda teatra grupo, al kiu aliĝis ĉ. 20 gek-doj junaj kaj maljunaj.

Nova Esperanta Lernolibro por Ruslingvanoj

Sub la tilolo *Esperanto en 12 Lecionoj, Helpilo por Komencantoj*, la Amura libroeldonejo en la urbo Blagoveŝĉensk en ekstrem-orienta parto de Sovetunio ĵus eldonis esperantan lernolibron por ruslingvanoj. Tiu ĉi lernilo konsistas el tri partoj: 1. enkonduko, kiu informas pri la historio de la internacia helplingvo kaj pri ĝia movado nuntempa; 2. 12 lecionoj kaj malgranda krestomatio; 3. esperanta-rusa kaj rusa-esperanta vortaretoj. La eldonkvanto estas 25,000 ekzempleroj. La apero de tiu ĉi nova lernolibro pruvas, ke la intereso pri Esperanto daŭre kreskas en Sovetunio.

E. Dancis

Sukcesa Internacia Kongreso de Esperantaj Fervojistoj

La 5-an de majo solene malfermiĝis, en la bela ĉefurbo de Hungarlando, la 14-a Internacia Kongreso de verdaj lokomotivistoj, konduktoroj, staciestroj, inĝenieroj kaj simplaj laborantoj de fervojo. Pli ol mil fervojistoj esperantaj el 20 landoj kunsidis sub la devizo "PER ESPERANTO

POR LA PACO!" "Ni bone scias," diris interalie en sia festparolado s-ano Stefano Kossa, ministro de Trafiko kaj Poŝto de Hungario, "ke la homa kulturo povas evolui nur en pacaj cirkonstancoj, ĝuste pro tio ni batalas ĉiam kaj ĉie por la paco, kaj ĉiuj esperantistoj en la mondo devas agi same." Lian parolon oni varme aplaŭdis. Jes, ĉiuj devas batali por la paco, kiu ja estas tiel bela, tiel nobla kaj tiel necesa por ni, por la tuta homaro.

Dank' al la fervora laboro de la organizantoj, dum la mallonga periodo de 7 tagoj (la 5-a ĝis la 11-a) okazis multaj interesaj aktivadoj: prelego pri *Evoluo de la Relosenbreĉigo kaj Aplikado de la Betonŝpaloj en Hungarujo*, prezento pri la plej nova speciala t.n. "mezuril"-vagono de la Hungara Ŝtatafervojo, renkontiĝo de la fervojistaj pacbatalantoj, kiun partoprenis gvidantoj de la hungara pacmovado, Árpád Szakasits, prezidanto de la Landa Packonsilantaro, Aleksandro Harmati, ĉefsekretario de la Patrolanda Popolfronto k.a. kaj gravaj demandoj de la pacmovado estis dume pri-traktitaj. Ankaŭ multaj ekskursoj estis aranĝitaj. Multaj vizitis al la urbo Miskolo, kies rapida evoluo kaptis la ĝeneralan atenton, al Lillafüred, al la iama amuzejo ekskluziva sed nun refreŝiĝejo de la laboruloj, kaj tra la ŝtalarbo Diósgyör, kaj la nova industria regiono kun Kazincbarcika kiel centro, al la groto Aggtelek, en kiu oni ĝuis ne nur belegan vidaĵon de stalaktitoj kaj stalagmitoj, sed ankaŭ mirindan

muzikon. La kongresanoj estas regalitaj ankaŭ per artaj kaj amuzaj programeroj, interalie per la baledo *Romeo kaj Julieto*.

Oni povas diri, ke grandan sukceson atingis la LKK, kiu akiris por si varman subtenon kaj en moralo kaj en materialo de la registaro. En la komenco oni antaŭkalkulis nur 500 partoprenantojn, sed aliĝis fakte 1080! Ĝojiga cifero, sed peniga afero. Tamen oni sukcesis solvi la malfacilojn. Ĉiu partoprenanto ricevis senpagan bileton por ĉiuj trafikiloj en Budapeŝto kaj la tuta Hungarujo. Oni presigis memorigan poŝtmarkon, poŝtkartojn pri Budapeŝto kun esperanta surskribo, farigis gramofondiskon de "La Espero" kun du esp-aj ĥorajetoj kaj unu muzikaĵo, eldonis prospektojn kun esp-a teksto pri la Pionira Fervojo, pri Budapeŝto kaj la lago Balaton. Kion alian oni volas ankoraŭ? Ni aldonu, ke oni aranĝis por la kongresanoj ankaŭ specialajn trajnojn kaj aŭtobusojn por la ekskursoj, kaj eĉ surtrajnajn poŝtoficejon. . . :

La 11-an de majo, s-ano ministro Kossa denove estis inter la kongresanoj por soleni la fermon. Li ĝuis kun ili la persipan ekskurson al Siofok kaj donacis al ĉiu kongresano belan fotoalbumon. Post la kongreso, je la 13-a de majo, oni organizis ankoraŭ unu ekskurson por la pli ol 300 restintaj kongresanoj al la universitata urbo Szeged, kie sin trovas la esperanta muzeo.

Pasis la ĝojaj horoj, sed restas la bela memoro. Eble ĝi neniam



forviŝiĝos el la koro de la verduloj fervoraj sur la fervojo?

Laŭ informo de s-ano

L. Kapitány

Ekspozicio per Helpo de Esperanto

En la urbo Tjevsk de Sovetunio oni sukcesis aranĝi sufiĉe grandan ekspozicion helpe de Esperanto por celebri la 50-jaran datrevenon de la fondiĝo de la ĵurnalo *Pravda* (Vero). En la ekspoziciejo montriĝis pli ol 60 ĵurnaloj, inter kiuj sin trovis *Renmin Ribao* (el Ĉinio), *Mundo Obrero* (organo de la Hispana Komunista Partio), *Harian Rakjat* (el Indonezio), *New Age* (el Hindio), *Peoples Voice* (el Novzelando) ktp. Ĉiuj tiuj materialoj estis senditaj de esperantistoj el diversaj partoj de la tuta mondo.

Tutpollanda Kunveno de Delegitoj de PEA

La 13-an de majo okazis Tutpollanda Kunveno de Delegitoj de Pola Esperanto-Asocio. Dum la kunveno oni pridiskutis la agadon de la Asocio dum la lastaj 18 monatoj. Inter ĝiaj plej gravaj atingoj estis la instruado de E. en 83 diverstipaj lernejoj kaj la organizo de 5^a regionaj estraroj kun salajrataj sekretarioj. Oni



La vizitantoj rigardas la ekspoziciaĵojn akiritajn per Esperanto.

konstatis, ke rimarkinde kreskis la prestiĝo de Esperanto en la pola socio. Por la venonta periodo oni akceptis kiel la ĉefajn taskojn plivastigon de la lerneja instruado de E, firmigon kaj kreskigon de la Asocio, pluan vastigon de konoj pri Pollando en la mondo kaj vastan kunlaboron kun la pac-batalantoj. Elektiĝis nova estraro de la Asocio kun doktoro Jerzy Loth kiel prezidanto kaj d-ro Stefan Hausbrandt kaj redaktoro Jerzy Uŝpieński kiel vicprezidantoj. Estas menciinde, ke prof. Loth estas fama geografo, mondvojaĝisto, membro de multaj sciencaj institutoj alilandaj inkluzive de la Reĝa Geografia Societo en Londono kaj vicprezidanto de la Internacia Olimpia Komitato.


Esperanta Diafilmo pri Budapesto

La Esperanto-Grupo de Metiista Kooperativo (IV. ker. Rezi Károly u. 58 sz., Budapest, Hungarujo) informas, ke ĝi sukcesis aperigi diafilmon pri Budapesto konsistantan el 81 bildoj kun esperanta klarigo. La prezo de ĝi estas 12.50 forintoj. Al interesiĝantoj oni volonte sendos prov-ekzempleron por interŝanĝe ricevi librojn aŭ fotojn.

Fondiĝo de Esperanta Informejo en Rio de Janeiro

Profesiaj ĵurnalistoj fondis en Rio de Janeiro informojn por brazila kaj alilanda gazetaro, radio kaj televido, kun la nomo "Esperanto-Press", kiu celas ĉefe informi la publikon pri la lingvo internacia. Ĝia fondiĝo estis solena kaj larĝe raportita en la grandaj gazetoj kun fotoj pri la inaŭguro. La adreso de la informejo estas: Avenida 13 de Maio, 47, Sobreloja 208, Rio de Janeiro, Brazilo.

(Daŭrigo sur p. 206)



Ismael Gomes Braga en la redak- tejo de "Esperanto-Press" verkas la unuajn informojn por la brazilaĵ gazetoj.

SUR NIA LIBROBRETO

GRAJNOJ EN VENTO

(n-ro 19, marto, 1962) — Multaj eble jam konis la gazeton laŭnome, sed kredeble nur malmultaj legis ĝin, ĉar ĝia eldona kvanto estas ege limigita. Ĝi ne estas presita, sed kopiita aŭ multoblita de la kontribuantoj (samtempe la abonantoj) mem. La redakcio nur kolektas la pretigitajn paĝojn kaj ilin broŝurigas. Tial rajtas ĝin ricevi nur tiuj, kiuj partoprenas la kolektivan laboron. Lasttempe la redakcio de la organizo kompleze sendis al ni du numerojn de tiu ĉi originala gazeto kaj ni volonte ĝin konigas al niaj legantoj.

Kiel oni scias, ke tiu ĉi gazeto estas interlerneja, tial la materialoj estas ekskluzive de lernantoj. En tiu ĉi numero troviĝas 35 kontribuajoj, ĉu verketoj ĉu pentraĵoj de geknaboj 10-12-jaraj, el 12 urboj de 9 landoj.

La enhavo estas varia kaj tre interesa eĉ por plenaĝuloj. La geknaboj rakontis siajn dezirojn, ŝatajn rakontojn, humorajojn, neforgeseblajn travivaĵojn kaj montras siajn imagoriĉajn pentraĵojn. Aprobinda entrepreno kaj disvastiginda sperto. Kiu volas rilatiĝi kun ĝi, skribu al la Centro: Grajnoj en Vento, Rue des Pins 66 Bienne/Biel 7, Svislando.

MALSUPRA SILEZIO HIERAŬ KAJ HODIAŬ, —

ĝia enhavo konsistis el tri artikoloj “Silezio de Pjastoj”, “La Hieraŭa Tago” kaj “La Nuntempo kaj Estonteco de Silezio” verkitaj de Romuald Cabaj, Franciszek Ryszka kaj Ignacy Rutkiewicz respektive. Kiel la titoloj de la artikoloj montras, ĝi priskribis la historion kaj la nunan staton de Silezio. Prezo: z1. 10. Oni povas

ĝin akiri de la Filio en Vroclavo de Pola Esperanto-Asocio, Wrocław, ul. Dubois 3, Pollando.

B. W. Schönborn: NI VIZITAS LA URBON KRAKOV

—zorge redaktita gvidlibro de tiu ĉi pola urbo, krom koncizaj klarigoj, ilustraĵoj pri la vidindaĵoj kaj mallonga skizo pri la historio de la urbo, troviĝas en ĝi ankaŭ plano de la urbo montranta dislokiĝon de la vidindaĵoj. Ĝin eldonis la Filio en Krakovo de Pola Esperanto-Asocio.

JUĜU MEM! — Faktoj pri Ĉeĥoslovakio. Tiu ĉi libreton ni jam recenzis en la 4-a numero de nia revuo en 1960. Nun eldoniĝis ĝia dua eldono en la sama formato sed reverkita kaj multe ampleksigita de 83 ĝis 110 paĝoj. Krome estas aldonita mapo de Ĉeĥoslovakio. Tio multe helpas al la legado.

La Ĉinaj Poŝtmarkoj

La 51-a kaj 52-a serioj de poŝtmarkoj speciale emisiita (10-VII-1962) de Ĉinio kun la temoj “Subteni la heroan Kubon”, “Subteni la bataladon de la Alĝeria popolo”.

- | | |
|---------------------------|------|
| 1. Heroa Kubo | 8c. |
| 2. Mastro de Tero | 10c. |
| 3. La Patrion Ni Defendas | 22c. |

- | | |
|-------------------------------|------|
| 1. Torĉo kaj Mapo de Alĝerio | 8c. |
| 2. Por la Liberigo de Alĝerio | 22c. |



Verkoj de Maŭ Zedong

| | P. | Formato- cm. | | Rb. | £ |
|---|----|-----------------|-----|------|--------|
| Praktiko | 24 | 13.2×18.7 | bd. | 0.18 | 0- 1-5 |
| | | | br. | 0.09 | 0- 0-8 |
| Pri Popoldemokratia Diktaturo | 24 | 13.2×18.7 | bd. | 0.18 | 0- 1-5 |
| | | | br. | 0.08 | 0- 0-8 |
| Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong | 18 | 13.2×18.7 | bd. | 0.18 | 0- 1-3 |
| | | | br. | 0.08 | 0- 0-6 |
| Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio | 30 | 13.2×18.7 | bd. | 0.18 | 0- 1-5 |
| | | | br. | 0.07 | 0- 0-7 |
| Komentarioj pri la Blanka Libro | 56 | 13.2×18.7 | bd. | 0.20 | 0- 1-7 |
| | | | br. | 0.13 | 0- 1-0 |
| Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an | 48 | 13.2×18.7 | br. | 0.09 | 0- 0-9 |

Literaturaj Verkoj kaj Aliaj

| | | | | | |
|--|-----|-----------|-----|------|--------|
| Ĉina Antologio (1949-1959) | 412 | 23×15.5 | bd. | 1.20 | 0-10-0 |
| Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Res- publiko | 88 | 19×26.3 | bd. | 0.60 | 0- 8-6 |
| Vivu Leninismo | 102 | 14×20.5 | br. | 0.16 | 0- 2-0 |
| Floroj kaj Birdoj (8 kolorpresitaj pk.) | | | br. | 0.08 | 0- 1-0 |
| Rakontoj pri Fantom-spitantoj | 98 | 12.3×19 | br. | 0.33 | 0- 2-7 |
| Laŭdezira Kalkulo de Kennedy | 25 | 13.2×18.7 | br. | 0.07 | 0- 0-7 |
| La Okcidenta Ĉambro (bildrakonto) | 88 | 13×18 | br. | 0.19 | 0- 1-6 |
| Mi Volis Viziti Lernejon (bildrakonto) | 76 | 13×18 | br. | 0.08 | 0- 1-0 |
| Karpetoj Transsaltis la Drakpordon (kolorpresita bildrakonto) | 30 | 18.2×20.5 | br. | 0.16 | 0- 1-3 |
| Knabino kaj Garolo (kolorpresita bildrakonto) | 38 | 17.2×25.3 | br. | 0.38 | 0- 3-0 |
| La Kultura Vivo de la Ĉinaj Labo- ristoj kaj Oficistoj (kun 90 fotoj) | 72 | 16.5×18.5 | br. | 0.25 | 0- 2-0 |
| Pejzaĝoj de Ĉinio (albumo kun 48 fotoj, el ili 13 kolorpresitaj) | 50 | 24×26.5 | br. | 0.63 | 0- 5-0 |
| Pitoreskajoj de Pekino (12 kolorpre- sitaj pk.) | | | br. | 0.13 | 0- 1-0 |
| Sinjoro Dongguo (bildrakonto adaptita laŭ antikva fablo) | | | | | |

Mendu ĉe perantoj aŭ la Administracio de EPC:

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



Korespondi Deziras

* Kant-instruistino **Helena Fuzesi**, Kecskemet, Csongradi ut 48, Hungario, instruanta 8-16 jarajn geknabojn, pri kandinstruado k interŝ. infan- k popolkantojn kun ĉl.

* **Marian Rajezak**, Zakopane, Ckvameovki 15 E/13, Pollando, pri sporto, turismo, fotografaĵo, literaturo, filmo, fremdaj lingvoj k kolektas bk. pm.

* **Potapov Jurij Aleksandroviĉ**, Rostov- sur-Don 8, Engelsa 15 kv. 3, Sovetunio, interŝ. bk. pm.

* **Pavel Dobias** serĉas en ĉl, korespondantojn por interŝ. pm. k alumetetiketojn. Resp. al ĉiuj. Adr. Markova 1111, Frenstat p. R. Ĉeĥoslovakio.

* **25 gestudentoj** el la universitato k gelernantoj el la Konstruista teknikumo, kun ĉl. Resp. garantiata. Adr. P. K. 11 Esp.-Societo "ALBATRO" junulara sekcio "Studenta Amikeco", VARNA, Bulgario.

* **Gemalsanuloj** junaj kaj geesperantistoj dez. ricevi leterojn. Skribu al N. I. Sigal, Kirova 52/25, Odessa A-11, Sovetunio.

* **Kim Kiw Seng**, 2-van, Zan Chen Don, Bonsansj, Koreio (K.D.P.R.) kun ĉl. pri ĉt.

* **Chen Zaisheng** (28 jara), Guoying 854 nongchang, Di-3 Fenchang Xiupeichang, HULIN, Heilongjiang, Ĉinio, kun. ĉl.

* **Werther Gennert** kun ĉl. por kolektado de il. pk. ktp. Adr. Berlin C2, Raupachstr. 4 II.

* **Prof. Allan Lake Rice**, Collegeville, Penna. USA, kun studentoj k instruistoj pri ĉt., precipe pri lingvoj k fervojoj k tramvojoj.

* **S-ro Carl Peek**, 17-jara biologia studento, kun ĉl. adr. 904 South Second, Millville, New Jersey, USA.

GRATULON

pro la Novaj Sukcesoj de Sovetunio en la Kosma Aviado

Kiam tiu ĉi numero estis jam prespreta nin atingis la novaĵoj, ke la spacŝipoj "Oriento III" kaj "Oriento IV" kun siaj kosmonaŭtoj sinsekve en la 11-a kaj 12-a de aŭgusto sukcesis eniri siajn tersatelitajn orbitojn proksimajn unu al la alia, kaj ili daŭre flugas en la ekstera spaco de la tero.

Ni, ĉinaj esperantistoj, sincere kaj ĝojege gratulas la senprecedencajn sukcesojn de niaj sovetuniaj fratoj en la konkero de la naturo.

13, aŭg. 1962.

Ĉina Esperanto-Ligo
Redakcio de E P Ĉ

* **F-ino. Diana Wright**, 901 Washington Street, Cape May, New Jersey, USA, studentino de psikologio, kun gejunuloj pri ĉt.

* **Georgi Iv. Statkov**, bul. "Dunav" blok 5, vh. "A" apart. 7 Vraca, Bulgario, 37-jara oficisto, kun ĉl. pri ĉt.

* **Bela Ferencalmi**, serioza kolektanto de alumet-etiketoj serĉas interŝ. precipe en orientaj landoj, laŭeble seriojn. Adr. Budapest. II. Frankel Leo-u. 49, Hungario.

* **Bak Cun -Hjeng**, K.E.A., P.O. Kesto 16, Pjeng-jang, Koreio (n), pri ĉt. k interŝ. diversajojn laŭ interkonsento. Nepre resp.

* **Esperanta Rondeto "Amikeco"**, Zk. Zeleznicarů, Ĉeska Trebova, Ĉeĥoslovakio, kun ĉl. pri ĉt., interŝ. pm. pi. ktp.

* **Junulara Esp. Rondo "Guto en Maro"**, Poŝta Liceo, str. Grodzka 34, Nowy Sacz 2, Pollando, kun ĉl.

* **Leonid Dolud**, USSR, Konstantinovka, Doneckoj obl. Internacianalnama 291-13, kolektas pm. bk. alumet-etiketojn, ekslibrisojn, esp-ajojn, malnovajn esp. librojn k revuojn. Resp. garantiata.

* **Vladimir Kvapil**, str. Nadrazni 344, BLUDOV, Ĉeĥoslovakio,

kun ges-anoj el Pacifik-oceana Insularo k el landoj ĉirkaŭ Pacifika Oceano.

Granda Konkurso — 205 Premioj

Mi volas festi kun vi la 15-an de dec. 1962. Partoprenu en la konkurso kaj vi povos gajni librojn kaj abonojn al revuoj. Per tio vi ankaŭ helpos min aranĝi pli bone mian E-ekspozicion, kiu vizitos multajn brazilajn urbojn. **35 abonoj al revuoj** (po 5): El Popola Ĉinio, Heroldo de Esperanto, Brazila Esperantisto, Espero Katolika, Kooperativismo, k. a. **170 valoraj libroj el Brazilo:** (po 10) Rui Barbosa — Biografia Eseo (286p), Antologio de Brazilaj Rakontoj (309p), Teatro (M. Assis — 159p), Memrorlibro de la 3a E. E. Mondkunveno (215p); 30 La Nigra Spartako (75p) kaj 100 Miniaturoj (77p).

Tre facile partoprenebla konkurso

1. Sendu minimume 3 bk. aŭ 30 pm., alumet-etiketojn, glumarkojn (kiun ajn, el kiu ajn lando) kaj vi kon-

(Daŭrigo sur p. 233)

El POPOLA ĈINIO

Dumonata Gazeto
eldonata de Ĉina
Esperanto-Ligo

Redakcio:

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Administracio:

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 5 (76) 1962

Bildo sur kovrilo — *Kiam vinberoj de Turfan-baseno maturiĝas*

Pri Lusin — la Fondinto de Ĉina Moderna Literaturo

Sunleviĝo ĉe la Stepo

Pri la Kultura Interŝanĝo

Ĉinaj Pentritaj Filmoj en la Pasinto kaj Nuntempo

Kio Estas Popola Ĉinio? (Poemo)

Ribelo kontraŭ la Ĉielo

Ĝang Jongŝou — Geniulo de Paptonda Arto

Kaŭzi Malagrablaĵon al Si Mem Pekina Loĝanto antaŭ Kvindek

Mil Jaroj

La Maŭzoleo de Hiang-fej

Matematiko Inspirita de Tableto

La Filo Iris al Mitingo

Donaco Akirinda!

Tranĉilakrigisto

La Bovo Jam en la Tero

Fablaj Poemoj

La Problemo de la Internacia

Lingvo kiel Ilo de Sciencaj

Interrilatoj kaj Sciencaj Verkoj

en Geografio

Kia Estas la Devo de Esperanta Poeto

Grava Peto al ĉiuj niaj amikoj Pensioj por Gelaboristoj en Ĉinio

La Ĉina Ŝako

Heroaĵo de Unu Kasistino

Pri Skriba Alfabeto de Esperanto

Niaj Danko kaj Donaco al Amikoj por la Paco


Esperanto Marŝas

Sur Nia Librobreto

Libroj Eldonitaj de ĈEL.



Ekzerco de remado.



Ekvilibro-trabo.



Sporta Insuleto

Sur la volejbalejo.

Ĉe la naĝejo.



Pitoreskaço
de Gujlin



Pentrita
de
Hu Jôsi